Quirino Bortolato



# Papo Pio Sankta

# Papo Pio Sankta

de Quirino Bortolato

Kajero de Espero Katolika

*Ĉi tiu verko aperis por la unua fojo en la revuo de IKUE "Espero Katolika", en la centa datreveno de ĝia fondiĝo, honore al la unua Papo, kiu benis la revuon kaj ĝiajn redaktorojn.*

*La 2a de junio 1906 Papo Pio la 10a akceptis aŭdience la roman prelaton Luigi Giambene, kiu poste rakontos en letero al la redaktoro de la revuo: "La Sankta Patro min tre afable ricevis hodiaŭ matene. Li akceptis vian laboraĵon. Li legis laŭte la poemon de pastro Dombrovski, kiu estas en la unua numero, dirante ĉe ĉiu verso: Mi komprenas!".*

*Kelkajn tagojn poste alvenis la letero de la papa ŝtatsekretariejo, kiu komunikis la "plaĉon kaj la Apostolan Benon" de la Papo.*

*Ekde tiam, Papo Pio ĉiam restis ameme proksima al la katolikaj esperantistoj, per diversaj elmontroj de patra zorgemo kaj instigo.*

*Sankta Pio la 10a vidis la unuajn paŝojn de Esperanto kaj benis ilin. Se nia katolika movado daŭre ekzistas, tio ŝuldiĝas ankaŭ al la profeteca vido de Papo Pio, ĉiela Patrono de la katolikaj esperantistoj.*

# Prezento

En la jaroj tuj antaŭ la Granda Jubileo de la jaro 2000 fokusiĝis la atento sur multaj historiaj datrevenoj rilate al Sankta Jozefo Sarto (Riese, 1835 - Romo, 1914), la sankta Papo Pio la 10a, la ĝis nun unika Papo sanktproklamita dum la lastaj 4 jarcentoj; la unika Papo en la historio kiu plenumis paŝtistan servadon en paroĥo (en Salzano, provinco Venecio kaj diocezo Trevizo, de 1867 ĝis 1875).
Kreskis sekve rimarkinda interesiĝo pri lia vivo, lia agado, pri la lokoj kaj personoj kiuj kontaktis lin.
La motivo de ĉi tiu eldono, kiu aperis felietone en "Espero Katolika", estas la konsekvenca postsekvo de ĉi tiu konsidero.
Krome, la eventoj de la periodo dum kiu li estis papo interplektiĝas ofte kun tiuj de la katolika esperantista movado: cent jarojn post tiuj eventoj, utilas memorigi lian agadon favore al la monda E-movado.
Oni sentis, fine, la neceson havi je dispono mallongan biografion de tiu sankta Papo en Esperanto, biografio kiu estu ankaŭ ĝisdatigita, ĉar la unika kiu ekzistas, verkita en 1951 de la aŭstria esperantisto Adolf Halbedl, jam estis sufiĉe malnova, kaj certe manka je la eventoj de la lastaj 50 jaroj.
Espero kuŝas en mia koro: ke mi sukcesis kaj ŝatigis al la esperantistoj de ĉiuj landoj la aromon de pastra vivo travivita klopodante glorigi Dion kaj bonfari al la gefratoj.

La datoj, pri kiuj mi aludis komence estas la jenaj. En 2000, dum la Jubileo, oni memorigis la 150an datrevenon de la eniro de Jozefo Sarto en la seminarion de Padovo, komenca etapo de pastra misio unika en la historio de la Eklezio.
En 2001 oni solenis la 100an datrevenon de la suriro de kard. Sarto, patriarko de Venecio, al monto Grappa (4an de aŭgusto 1901) por la beno de la pilgrimloko de la Dipatrino; la 50an datrevenon de lia beatproklamo (3an de junio 1951); la 150an datrevenon de la morto de kard. Jacopo Monico (1778-1851), patriarko de Venecio kaj mecenato de Jozefo Sarto; la 50an datrevenon de la elekto de Pio la 10a kiel universala patrono de la katolikaj esperantistoj (IKUE-kongreso en Munkeno: oni elektis lin "ĉiela patrono de la katolikaj esperantistoj" per aklamo).

Krome, en tiu jaro 2001, estis la 50a datreveno de la publikigo de biografio “Papo Pio Beata”, de Adolf Halbedl (1893-1983), eldonita de presejo Antonio Paolet de San Vito al Tagliamento, prestiĝa eldonejo kiu inter 1912 kaj 1972 publikigis preskaŭ centon da E-verkoj.
En 2002 oni memorigis la 50an datrevenon de la translokado de la nekoruptita korpo de Pio la 10a sub la altaron de la Prezento de Maria ĉe la Templo, en la baziliko de Sankta Petro en Romo (la 17an de februaro 1952).

La plej grava jaro sendube estas 2003, la jaro de la jarcenta datreveno de la elekto de kard. Jozefo Sarto al papado (4an de aŭgusto 1903), kiu, nur tri monatojn poste, la 4an de oktobro, konigis sian unuan enciklikon “E supremi apostolatus cathedra” (“El la plejsupera apostola katedro”, en kiu enestas ankaŭ la papa devizo *Instaurare omnia in Christo*, tio estas “Refondado de ĉio en Kristo”) kaj, nur 111 tagojn post la elekto, la *motu proprio* (t. e. meminiciata decido) “Tra le sollecitudini del ministero pastorale” (Tra la zorgemoj de la paŝtista ŝarĝo) por la reformo de la ekleziaj muziko kaj kanto.
Koncerne esperantismon, ni memoru la 100an datrevenon de la unua numero de “Espero Katolika” kaj de la poemo dediĉita al Pio la 10a de Aleksandro Dambrauskas Dombrovski (1860-1938). Aliaj malpli rimarkindaj datoj estas la jarcenta datreveno ekde la malfermo por pilgrimuloj kaj turistoj de la naskiĝdometo de Pio la 10a; la 80-jariĝo ekde la starto en 1923 de la dioceza ordinara proceso, inaŭgurita de la episkopo de Treviso, Andrea Giacinto Longhin (1863-1936), beatproklamita de Johano Paŭlo la 2a la 20an de oktobro 2002; kaj la 60-jariĝo ekde la inaŭguro de la roma apostola proceso en 1943.
En 2004 estas la 50a datreveno de la sankproklamo (29an de majo 1954) kaj en 2005 la unua centa datreveno de la biografio verkita de mons-ro Angelo Marchesan, publikigita felietone en 1904-1905, unu el la plej kompletaj verkoj pri Pio la 10a.
2006 koncernos tute rekte la movadon de la katolikaj esperantistoj (kaj ne nur!), ĉar soleniĝos la centa datreveno de la eldiro de Pio la 10a favore al Esperanto (2an de junio 1906).
Poste, en 2009, oni memorigos la centan datrevenon de la aŭdienco de la 4a de aprilo 1909, dum kiu Pio la 10a eldiris la profetecan frazon: “Esperanto havas fronte al si grandan estontecon”.
Fine, en 2014 oni solenos la centan datrevenon de lia morto (20an de aŭgusto 1914) por la surtera mondo kaj lia naskiĝo en

la ĉiela patrujo.

Mi ne povas fini ĉi tiun enkondukon sen 3 nepraj dankoj kaj unu memorigo.
Mi ŝuldas dankemon al d-ro Serio Boschin, estrarano de IKUE, iama prezidanto de ĝia itala sekcio, kiu alproksimigis min per amemo kaj zorgemo al la "verda" esperantista mondo en 1989; al Carlo Sarandrea, kiu per granda pacienco, fakuleco kaj sindediĉo prizorgis ĉi tiun eldonon, reviziis tekstojn, enmetis la fotografiojn kaj... preskaŭ faris miraklojn; al pastro Duilio Magnani, kiu, kvankam de malproksime, priflegis miajn paŝojn en la "nova mondo"; kaj mi ŝuldas honorigon al la memoro de d-ro Mario Sola (1933-98), abrupte forpasinta juna en la nokto de la unua de januaro 1998.
Kun amema kaj respektoplena alttaksado al ĉiuj esperantistoj de la mondo.

QUIRINO BORTOLATO

**Quirino Bortolato** naskiĝis en Salzano (Venecio) la 28an de februaro 1946.
Aldone al tiuj sciencaj, li kulturis - ĉiam kiam eblis - historiajn studojn pri fiziko kaj matematiko kaj ĉefe pri la vivo kaj agado de sankta Jozefo Sarto, sankta Pio la 10a, paroĥestro de Salzano de 1867 ĝis 1875, la unika papo en la historio de la Eklezio, kiu faris la sperton de animpaŝtisto en paroĥo.
Post doktoriĝo pri nuklea fiziko en 1970, d-ro Bortolato ricevis la diplomon de profesia kvalifiko por la instruado de fiziko kaj matematiko. Li estis profesoro en 1970 en mezlernejo "Dante Alighieri" de Salzano; ekde 1971 ĝis 1982 en la instituto por kontotenistoj kaj geometroj de Mirano (poste titolita "Okan de marto"), kaj ekde 1982 ĝis 2001 en la ŝtata scienca liceo "Ettore Majorana" de Mirano (Venecio). Ekde 2002 li instruas en la sekcio "scienca liceo" de la prestiĝa salezana Kolegio "Astori" de Mogliano Veneto (Treviso).
En 1983 li estis unu el la proponantoj por la starigo de la Fondaĥo Jozefo Sarto de urbo Riese Pio X (Treviso), kun kiu li kunlaboris de 1985 ĝis 1999.
Ekde 1999 li estas prezidanto de asocio "Tempo e Memoria" (tempo kaj memoro) de Salzano, kiu aktive kaj laŭ originala maniero agas favore al la historio de la paroĥa kaj civila komunumo de la urbo kaj por la progreso de historiaj esploroj pri sankta Jozefo Sarto.
Bortolato estas aŭtoro de multaj verkoj publikigitaj ekde 1973 ĝis hodiaŭ.
Li kunlaboras kun ĉiuj, kun kiuj eblas en la mondo kundividi spiriton de esplorado serioza, honesta kaj senprofita.



# ENHAVO


Pri ĉi tiu verko IV
Prezento V
Biografio de la aŭtoro VII

La praavoj de Jozefo Sarto de la 15a ĝis la 19a jarcento 1
La infanaj kaj adoleskaj jaroj de Giuseppe Sarto (1835-1850) 5
En la seminario de Padovo
(13an de novembro 1850 - 14an de aŭgusto 1858) 9
Kapelano de Tombolo (novembro 1858 - majo 1867) 12
Parokestro de Salzano (majo 1867 - novembro 1875) 15
Kanoniko en Treviso (novembro 1875 - novembro 1884) 22
Episkopo de Mantova (novembro 1884 - junio 1893) 24
Kardinalo, patriarko de Venecio (1893-1903) 29
Papo Pio la 10a (4an de aŭgusto 1903 - 20an de aŭgusto 1914) 33
La kanonikaj procesoj (1923-1946) 42
La glorado kaj la famo de Sankta Pio la 10a en la nuntempa mondo 44
Kronologio 51

## La praavoj de Jozefo Sarto de la 15a ĝis la 19a jarcento

Familio Sarto ekloĝis en Riese (elp. Rieze) nur en la dua duono de la 18a jarcento: precize, ili atingis Riese en 1763, devenante el la najbara vilaĝo Castello di Godego (elp. Kastelo di Godego), en provinco kaj diocezo de Treviso (elp. Trevizo).

Ĉi tiu branĉo de la familio, al kiu apartenas rekte Jozefo Sarto, Papo Pio la deka, estingiĝis en 1930, pro la morto de Maria Sarto, la lasta el la senedzaj fratinoj de la Papo.

La genealogiaj esploroj, kiujn kompletigis Francesco Franceschetti[1] (elp. Franĉesko Franĉesketi), mons-ro Angelo Marchesan[2] (elp. Anĝelo Markezan) kaj Antonio Gheno[3] (elp. Antonio Geno), konkludas, ke la praavoj de Papo Sarto verŝajne devenas el Villa Estense (Padovo): ĉi-teme ili konsideras bazohava, kvankam ne ĉiam preciza, genealogian dokumentaron, kiun ili datas je la fino de la 15a jarcento.

Branĉo de familio Sarto, kies intertempaj eventoj estas parte konataj, translokiĝis el ĉi tiu loko al San Giorgio in Brenta (elp. San Ĝorĝo in Brenta), vilaĝeto apud Cittadella (elp. Ĉitadela), murĉirkaŭita urbo en



*Kampara vivo en la naskiĝvilaĝo de Pio la 10a. Li naskiĝis la 2an de junio 1835, filo de Giovanni Battista Sarto, komunuma pedelo, kaj de Margherita Sanson, analfabeta kudristino.*

provinco de Padovo kaj en diocezo de Vicenza, kiu iam estis padova fortikaĵo.

En ĉi tiu loko ĉe la rivero Brenta naskiĝis Anzolo Sarto (1721?-1784), kiu edziĝis la 22an de majo 1761 en Castello di Godego kun Antonia Liviero, vidvino de Zamaria Fratin. Ĉi tiuj estas la patro kaj la patrino de la avo de la estonta Papo.

Temis pri nejuna geedza paro (ambaŭ estis preskaŭ 40-jaraĝaj). El ilia geedziĝo naskiĝis Jozefo Sarto (1762-1841), ilia unika filo, pri kiu estus informoj kaj konfirmo pri datumoj en la dokumentaro daŭre konservata en Castello di Godego kaj en Riese[4]. Li estas la laŭpatra avo de la samnoma estonta Papo.

Kiel dirite, unu jaron poste, en 1763[5], familio Sarto ekloĝis definitive en Riese.

En ĉi tiu nova komunumo Jozefo Sarto, bienulo, estis komunuma pedelo, kaj edziĝis kun Paola Giachiello (1765-1837).

El ilia geedziĝo naskiĝis, dum 25 jaroj ekde 1784 ĝis 1809, entute 11 gefiloj: 6 knabinoj kaj 5 knaboj. Nur ses el ili transvivis.

La kvara naskito estis Giovanni Battista (aŭ Giambattista aŭ Giobatta, t. e. Johano Baptisto) Sarto (1792-1852), la patro de la estonta Papo[6].

Giuseppe Sarto kaj Paola Giachiello loĝis en la hejmo de la bopatrino de li, Angela Girardi, proprietulino de tiu domo en kiu estonte naskiĝos Papo Pio la 10a.

Familio Sarto ne estis malriĉa, ĉar ĝi havis plurajn posedaĵojn: du domojn kaj ses hektarojn da grundo[7].

La disdivido de la familia havaĵo pri nemoveblaĵoj inter la ses transvivintaj gefiloj - kio ne estas ĉiam facile rekonstruebla eventaro laŭ historiaj kaj notariaj dokumentoj - igis Giovanni Battista proprietulo de du kampoj kaj de unu domo (tiu en kiu naskiĝis la estonta Papo Pio la 10a: la domo originis el hereda posedaĵo de la laŭpatrina avino de la Papo).

Giovanni Battista Sarto estis preskaŭ 41-jaraĝa kiam li edziĝis, la 13a de februaro 1833, kun Margherita Sanson (1813-1894): la edzino estis nur 20-jara, kaj ilia geedziĝo estis benata de la kapelana pastro Pier Paolo Pellizzari (elp. Pelicari, naskita en Sankta Vito d'Asolo, 1807, kaj mortinta en Vallò de Riese, 1875).

La edzo, kiel sia patro, estis bienulo kaj komunuma pedelo; lia tre juna edzino, kiu naskiĝis en Vedelago, nemalproksime de Riese, estis la filino "malklera", t. e. analfabeta, de trinkejestro Melchiore Sanson (1786-1870), kaj ŝi estis kudristino kiel sia patrino, Maria Antonini.

## NOTOJ POR LA UNUA ĈAPITRO

**1** FRANCESCHETTI F., *Gli antenati del Sommo Pontefice Pio X. Memorie storico-genealogiche [La praavoj de la Ĉefpontifiko Pio la deka. Historiaj-genealogiaj memuaroj],* Presso il Collegio Araldico, Roma, 1903, p. 21.

**2** MARCHESAN A., *Papa Pio X nella sua vita e nella sua parola [Papo Pio la deka dum sia vivo kaj en sia parolo]*, Stabilimenti Benziger kaj Co.SanktaA., Einsiedeln, 1905, pp. 23-25; la volumo entenas genealogian arbon de la familio Sarto, p. 17.

**3** GHENO A., *La patria di Pio X [La patrujo de Pio la deka],* Estratto dalla Rivista del Collegio Araldico, Anno I, N. 11-12, Presso il Collegio Araldico, Roma, 1903, p. 14.

**4** Bonvolu konsulti la rekonstruon de la eventoj de familio Sarto en la libro BORTOLATO Q., *La casa natale di Pio X ed il museo di Sankta Pio X. Cenni storici e catalogo museale [La naskiĝdomo de Pio la 10a kaj la Muzeo de Sankta Pio la 10a. Historiaj skizoj kaj muzea katalogo]*, Fondazione Sarto, Riese Pio X, 1992, pp. 9-24.

**5** La prinotado troviĝas en kanonika registro, kiu estas sentitola "stato de l'animoj" (Registro de la tiatempa paroka loĝantaro) kaj sen dato de kompilado, konservata en la Paroka Arkivo de Riese Pio X.

**6** Ekde 1996 urbeto Jemielnica, en Supra Silesio, nuntempe sub pola administrado, depostulas la fakton esti la naskiĝvilaĝo de Giovanni Battista Sarto, la patro de Giuseppe Sarto, la estonta Pio la 10a: laŭ la loka gazeto *Panorama* (Panoramo, N.

*La naskiĝdomo de Giuseppe Sarto. En la suda korto estis starigita en 1935 muzeo kiu konservas memoraĵojn pri li.*



33, 18an de aŭgusto 1996), kiun alia gazeto, *Schlesisches Wochenblatt* (Semajna Silesia Gazeto, N. 45, 8an-14an de novembro 1996) parte kopiis, polo laŭnome Jan Krawiec (t.e. Sarto) estus elmigrinta al Italio kiam sia patrujo estis aneksita al Prusujo (la loknomo Jemielnica estas egalvalora al prusuja Himmelwitz), kaj tie li estus trovinta politikan azilon, unue en Castello di Godego kaj poste en Riese, doninte tiel poste originon al la familio el kiu naskiĝis la venetia Papo. Ĉi tiujn informojn komunikis al mi s-ro Jörg Horn el Koblenco (Germanio), kiu ankaŭ sendis al mi konsiderindan gazetan materialon kaj atentigis min pri la eseo en kiu la sciigo estas entenata (MALACHI M., *The Keys of This Blood The Struggle for World Dominion Between Pope John Paul II, Mikhail Gorbachev, and the Capitalist West [La ŝlosiloj de ĉi tiu sango La batalado por la monda superregado inter la Papo Johano Paŭlo la 2a, Mikaelo Gorbaĉov kaj la Kapitalisma Okcidento]*, New York 1990, p. 535). Neutile substreki la falsaĵon de ĉiuj ĉi tiuj rilatoj, pro la fakto ke estas konservataj ĉe la Paroka Arkivo de Riese ĉiuj aktoj pri Giovanni Battista Sarto (aktoj de naskiĝo, de geedziĝo kaj de morto, pro "pleŭrito") kaj pri lia familio.

**7** En la Paroka Arkivio de Riese estas konservata *Listo de la Malriĉaj Familioj de la Paroko de Riese*: estas en la listo 132 familioj, entute 538 unuopuloj inter 1848 loĝantoj (29,11%); prinoto atentigas, ke "oni povus aldoni la sekvantajn": sekvas 10 familioj kaj 42 unuopuloj, entute 142 familiaj grupoj kaj 580 malriĉuloj (31,39%). Inter ili neniu Sarto estas menciata, kiel pruvo ke la familio Sarto ne estis taksebla mizera kaj bezonanta familio, kiel nale fantaziaĵo pri Giuseppe Sarto ankoraŭ hodiaŭ celas pravigi: se oni volas paroli pri "malriĉeco de familio Sarto", oni povas fari ĝin nur laŭ limigita maniero, kaj nur depost la morto de Giovanni Battista Sarto, do ekde 1852, la jaro en kiu lia vidvino Margherita Sanson devis vivteni sian familion per la enspezoj de sia laboro kiel kudristino kaj per la produktaĵoj de la agrikultura agado en ŝiaj kampoj. Ke ankaŭ lia filo, nun jam pastriĝinta, ne dronis en riĉaĵojn estas vaste dokumentita. Fakte pastro Giuseppe Sarto en du leteroj de la jaro 1875 dankis sinjoron Antonio Monico el Riese pro la prokrasto de ŝuldo da "Aŭstriaj Liroj 1000 (Mil) je 6% [interezo] redonendaj ene de jaro 1868": eĉ se surprenita ekde la lasta jaro en Tombolo, kaj precize en 1867, ĝi ne estis ankoraŭ repagita. Kaj la prapatraj proprietaĵoj en Riese? "La du hektaroj de la patra heredaĵo estis jam venditaj, per aktoj en dato 2an de decembro 1877, al Antonio Monico kaj al Pietro Montin. Eĉ la naskiĝdometo, pri kiu ŝvebis la ebleco esti vendita, estis savita lastmomente" (SARTO G., *Lettere di Sankta Pio X [Leteroj de Sankta Pio la 10a]*, zorge de Nello Vian, Gregoriana Editrice, Padova, 1958, p. 72). Eĉ inter 1886 kaj 1888, kiam li estis jam episkopo de Mantovo, li havis kelkajn problemojn pro ŝuldoj. En 1886 "li kune kun la gefratoj vendis 34 terpecojn, korespondajn al preskaŭ 3 hektaroj kaj duono da grundo, kiuj estis la lasta restaĵo de la familia havaĵo kaj kiuj devenis de la posedaĵdispartigo kun onklo" (SARTO G., *Lettere di Sankta Pio X [Leteroj de Sankta Pio la deka]*, zorge de Nello Vian, Gregoriana Editrice, Padova, 1958, p. 139; konsultu ankaŭ la paĝojn 55, 57, 138-139, 167-169, 263). G. Romanato, citante leteron de Sarto skribitan al samnoma kuzo loĝanta en Venecio ekde aprilo 1866, konkludas ke "ĝis la morto de la patro, la familio Sarto povis ĝui sufiĉe trankvilan ekonomian situacion. Tamen oni klare ekscias el la paroladoj de la filo, ke Giambattista ne estis administranto tute specife atentema kaj antaŭ ol morti li surprenis egajn ŝuldojn. Post lia morto, kaj la konsekvenca, subita manko de liaj gajnoj, la ŝuldoj neniigis laŭvorte la familion, tiom ke en 1866, kiam estis skribita la letero supre citita, t. e. dekkvar jarojn poste, la situacio ne estis ankoraŭ reekvilibrigita, kaj ĝi restos necerta almenaŭ dum kroma jardeko" (ROMANATO G., *Pio X La vita di Papa Sarto [Pio la deka La vivo de Papo Sarto]*, Rusconi, Milano, 1992, p.66).

## La infanaj kaj adoleskaj jaroj de Giuseppe Sarto (1835-1850)


Ekde 1834 ĝis 1852, dum la 19 jaroj de sia geedziĝo, Giovanni Battista Sarto kaj Margherita Sanson havis 11 gefilojn, el kiuj la estonta Papo estis la dua naskito.

En preskaŭ ĉiuj biografioj oni mencias nur dek gefilojn, laŭ la jena ordo kaj sekvante la evidentan ordigon laŭ naskiĝdato: Giuseppe (31 januaro 1834 - 6 februaro 1834), Giuseppe Melchiore (2 junio 1835 - 20 aŭgusto 1914, la estonta Papo), Angelo (26 marto 1837 - 9 januaro 1916), Teresa (26 januaro 1839 - 27 majo 1920), Rosa (12 februaro 1841 - 11 februaro 1913), Antonia (26 januaro 1843 - 2 marto 1917), Maria (26 aprilo 1846 - 30 marto 1930), Lucia (29 majo 1848 - 19 junio 1924), Anna (4 aprilo 1850 - 29 marto 1926).

Sed ja estis "dek unua filo": Pierluigi aŭ Pier Luigi (26 januaro 1845 - 6 februaro 1845). Pri li, sepa naskito de geedzoj Sarto-Sanson kiu vivis nur 12 tagojn, neniu biografo parolis ĝis nun. Li estas menciita en *la Registro dei morti Libro Secondo Parrocchia di Riese dal dĵ 1.° Gennaio 1829. al 10. Febbrajo 1845*, N. 11 *[Registro de la mortintoj Dua Libro Paroko de Riese ekde la unua de januaro 1829 ĝis la deka de februaro 1845, N. 11]*: li mortis pro "spasmiga afekcio la 8an de Februaro 1845 je la 5a posttagmeze en domo propra".

Giuseppe Melchiore Sarto, la estonta Pio la 10a, naskiĝis la 2an de junio 1835, kaj la postan tagon, la 3an de junio 1835, baptis lin la kapelana

*Panoramo de Riese*



pastro Pier Paolo Pellizzari, la sama kiu, iom pli ol 2 jarojn antaŭe, geedzigis liajn gepatrojn.

Giuseppe Sarto naskiĝis en Venecilando sub la aŭstria regado: tiu regiono estis atribuita al la influsfero de la aŭstra-hungara imperio laŭ la decidoj de la Kongreso de Vieno (1815). Li estis tre lerta en la elementlernejo: kelkfoje li anstataŭigis la instruiston Francesco Gecherle (elp. Franĉesko Ĝekerle). Li estis tre vigla knabo kaj montris tuj vervan, impulsiĝeman kaj rigoran karakteron kaj, aldone al la fakto ke li kapablis legi kaj skribi, "lernis eĉ mesoservi, li "frekventis la ĥorejon" (unuvorte, vizitis la preĝejon). Li neniam forestis el la instruoj de la kristana doktrino, de la katekismo kaj de la aliaj instruadoj"[8].

Ĉiutage li iris preĝi en la maria pilgrimloko en Cendrole (elp. Ĉendrole), la paroka ĉefpreĝejo de ĉiuj parokoj de la ĉirkaŭaĵoj, kaj ekde sia infanaĵo li estis vokita al pastreco.

Pastro Tito Fusarini (Mestre, 1812- Venecio, 1877), parokestro de Riese ekde 1842 ĝis 1853, aldone al la studado de la kristana doktrino, adresis lin, verŝajne en 1844, al la studado de la latina lingvo: al li instruis kapelano pastro Luigi Orazio, kiu poste mortis en Santandrè (Treviso) en la jaro 1884.

Dekjara, Sarto ricevis la sakramenton de konfirmacio (kiun, en tiu epoko, oni donis antaŭ la sakramento de la Eŭkaristio) en Asolo (elp. Azolo), la 1an de septembro 1845, fare de episkopo Giovanni Battista Sartori Canova, kaj dekunujara li estis allasita al la unua komunio la 6an de aprilo 1846[9].

La 22an de aŭgusto 1846 li superis kiel ekstera lernanto la ekzamenon, fiksitan por la konkludo de la unuagrada ciklo de la studoj, ĉe la elementa lernejo maĵora de Treviso kaj poste li komencis viziti la gimnazion en Castelfranco Veneto (elp. Kastelfranko Vèneto).

Li piediris ĉiutage al tiu kastela ĉefurbo, kiu distancis el Riese 7 kilometrojn, foje kun la lignoŝuoj sur la ŝultroj, por ilin ne konsumi, foje per kunveturoj sur ĉaroj. Ĉiun jarduonon li eltenis la ekzamenon ĉe la seminario de Treviso, rezultante ĉiam la unua kun la plejalta noto.

Li frekventis la gimnazian lernejon de Castelfranco ekde aŭtuno 1846 ĝis somero 1850. Por la tagmanĝo li iris ĉe la familio de Giovanni Battista Finazzi, impostokolektisto de la distrikto de Castelfranco: tie kelkfoje li ankaŭ tranoktis kaj donis privatajn lecionojn al la geknaboj.

Ĉe la fino de la kvara gimnazia kurso li rezultis ankoraŭfoje la unua: li kronis fakte siajn studojn en 1850 en la seminario de Treviso (unika lernejo de la diocezo kiu povis atesti oficiale la leĝan valoron de la studoj pere de



*Lia patrino*

ekzameno) kun la plej altaj notoj, rezultante "eminenta" en ĉiuj lernobjektoj, la unua el 43 lernantoj, kiuj konkuris private kaj venis el diversaj lokoj de la provinco de Treviso.

Li estos ĉiam kaj sen nenia escepto la plej diligenta en ĉiuj kursoj.

Lia familio, malriĉa kiel estis multaj aliaj en tiu tempo, sed certe ne unu el la plej malriĉaj en Riese, estis tre solidareca, patriarka familio: unu el la multegaj familioj de "katolikoj" en Riese, kiuj formis la parokan komunumon de Sankta Mateo kaj kiuj vivis intense sian religian kredon.

Riese estis elinter la parokoj unu el la plej homogenaj el la vidpunkto de la kristana kredo, "enplektita de observemo kaj de ĝermantaj devotecoj inter la familioj", kaj laŭdis sian superecon havi tre malaltan procenton da nekonfesintoj (t.e. da tiuj, kiuj eĉ je Pasko ne aliris la sakramentojn: iom pli ol 1%), kaj distingiĝis pro granda religia pieco: "en Riese la reto de la kunfrataroj estas densega"[10].

Kontraŭe lia patro, la komunuma pedelo Giovanni Battista Sarto, ne estis kontenta, ke la filo sekvu la pastran vokiĝon kaj daŭrigu la ekleziajn studojn[11].

*La elementa lernejo en Riese dediĉita al la patrino de la estonta Papo Pio*



## NOTOJ POR LA DUA ĈAPITRO

**8** MARCHESAN A., *Pio X nella sua vita e nella sua parola [Papo Pio la deka laŭ lia vivo kaj vortoj]*, Benziger & Co. Sankta A., Svislando, 1904-05, p. 26.

**9** La historiistoj la plej akredititaj kaj variaj hagiografiaj studadoj mencias la daton, unujare postigitan, de la 6a de aprilo 1847, sed prof-ro Alessandro Favero (Sankta Zenone degli Ezzelini, Treviso, 27 julio 1916-Riese Pio X, 25 januaro 1990) en 1965 publikigis la rezultojn de siaj arkivaj esploroj (*Ignis ardens [Ardanta Fajro]*, dumonata bulteno de Riese Pio X, XIIIa Jaro, n. 2, Marto-Aprilo 1965, pp. 13-14). La listo de la konfirmaciitoj en la katedralo de Asolo fare de mons-ro Sartori Canova la 1an de septembro 1845 estas entenata en la *Libro dei cresimati dal 7 Junio 1777 al 28 Settembre 1871 [Libro de la konfirmaciitaj de la 7a de junio 1777 ĝis la 28a de septembro 1871]*, kie rezultas registritaj 140 geknaboj de Riese; je n-ro 58 oni trovas listigita "Sarto Giuseppe de Johano Battista kaj Margherita Sanson, dekjara. Konfirmacipatro Francesco Trinca el Vallè". Kune kun la sama konfirmacipatro estas registrata je n-ro 59 la okjara frato Angelo. De aprilo 1846 estas listo da 13 knaboj kaj 17 knabinoj "allasendaj al la Komunio en 1846": unualoke en la listo de la knaboj estas enlistigata "Sarto Giuseppe de Giovanni Battista - 11-jara - aprobita".

**10** GAMBASIN A., *Parroci e contadini nel Veneto alla fine dell'Ottocento [Parokestroj kaj kamparanoj en Venecilando je la fino de la 19a Jarcento]*, Ed. di Storia e Letteratura, Roma, 1973, p.192-193.

**11** Lia fratino Lucia atestis dum la kanonika proceso, kvankam asertante ke ŝia patro estis "bona kristano", tamen substrekis ke "li estis tute ne kontenta ke la Diservanto pastriĝu kaj kelkfoje okazis disputo kun la patrino kaj kun la patro. [...] Li devis lukti kun la patro kiu ne volis lasi lin daŭrigi la eklezian karieron". ROMANATO G., *Pio X La vita di Papa Sarto [Pio la 10a La vivo de Papo Sarto]*, Rusconi, Milano, 1992, p.26.

*Tri el la fratinoj de Giuseppe Sarto*



## En la seminario de Padovo (13an de novembro 1850-14an de aŭgusto 1858)



Por permesi al Jozefo Sarto la daŭrigon de la studado intervenis la riesa kardinalo kaj poeto Jacopo Monico (elp. Iakopo Moniko) (1778-1851), filo de forĝisto Adamo Monico kaj de Angela Cavallin (elp. Anĝela Kavalin): en la unua momento li estis profesoro en la seminario di Treviso, kaj estis poste parokestro de Sankta Vito d'Asolo (li estis elektita en 1818 de la unuanimeco de la familiestroj); nomumita de Papo Pio la 7a episkopo de Ceneda (elp. Ĉeneda) la 16an de marto 1823, li iĝis fine en 1827 patriarko de Venecio (kien li eniris la 8an de septembro) kaj ĉi tie li restis ĝis 1851, jaro en kiu li mortis[12].

La 28an de aŭgusto 1850 alvenis al familio Sarto la komuniko, ke la juna Jozefo povas eniri en la Seminarion de Padovo kaj okupi la senpagan lokon, kiun antaŭfiksis de longe la kolegio Tornacense Campion[13] (elp. Tornaĉense Kampiòn).

La 19an de septembro 1850, 15-jara, li surmetis la pastran veston, kaj la 13an de novembro 1850 li eniris definitive en la padovan seminarion, kiu estis reformita de Sankta Gregorio Barbarigo (1625-1697), episkopo de Padovo de 1664 ĝis sia morto.

La juna seminariano restis ĉiam en letera kontakto kun siaj ekleziaj edukistoj en Riese, precipe kun pastro Petro Jacuzzi (elp. Iakucci) (Artegna, 1819 - Treviso, 1902).

Post la unua jaro de la seminaria lernejo li estis juĝita la "unua kun ĉiuj eminentecoj": la samaj lernejaj rezultoj aperos ĉiam, kun rigora precizeco de 1850 ĝis 1858, dum la tuta gimnazia, licea kaj teologia studkarieroj.

Li distingiĝis senprokraste, krom pro siaj intelektaj kapabloj, eĉ pro forta, elstara personeco: 19-jara junulo li estis taksita de siaj superuloj en la kondiĉo ofici kiel "unua prefekto" de la seminaria dormejo de 1854 ĝis 1858. Kiel tia, li devis redakti sintezajn juĝojn pri siaj kunuloj en la vokiteco, rimarkigante la esencajn trajtojn pri ĉies karaktero: la historiistoj malkovris en li esceptan talenton kompreni la homan animon[14].

En la padova seminario li ellernis precipe la latinan lingvon kaj la religian muzikon. Lia intereso por ĉi-lasta estis vere rimarkinda: li elprovis sin en la komponado de 15 muzikaj pecoj por la Sankta Semajno; li estis elektita instruisto de muziko por la klerikoj kaj muzika direktoro de la kapela koruso

de la seminario[15].

En la disciplinoj de la ordo de la studoj li rezultis ĉiam inter la unuaj, precipe li estis eminenta lernanto pri la latina lingvo kaj pri matematiko, iomete malmulte pri filozofio: en la latina lingvo li ne povis ne esti tia, pro siaj rimarkindaj kapabloj, kaj dum lernado li estis prilumita per la malkovro de la humanisma genio de pastro Egidio Forcellini (elp. Eĝidio Forĉelini) (Campo, Alano di Piave, Belluno, 1688-1768, elp. Kampo, Alano di Piave, Beluno), kiu estis la aŭtoro de la *Lexicon totius latinitatis* (Leksikono de la tuta latina kulturo - aperinta post la morto de la aŭtoro en 1771).

Ses jarojn antaŭ ol ricevi la sakramenton de la religia ordino, la vivo de la juna Sarto neatendite iĝis pli malfacila pro la morto de lia patro Johano Baptisto (la 4an de majo 1852). Kaj tiu sama jaro 1852 estis des pli malfeliĉa por li pro la morto de lia lasta frato, Petro Gaetano, naskita 4 tagojn antaŭ la morto de lia jam sesdekjara patro, kaj mortinta apenaŭ ses monatojn post tiu forpaso, la 30an de oktobro 1852.

De 1856 ĝis 1858 li estis allasita al la diversaj gradoj de la religiaj ordinoj, en la seminario de Treviso, fare de episkopo Farina: unue al la minoraj ordinoj (pordisteco kaj lektoreco, 22an de novembro 1856 - ekzorcisteco kaj akoliteco, 6an de junio 1857), poste al la maĵoraj ordinoj (subdiakoneco, 19an de septembro 1857 - diakoneco, 27an de februaro 1858).

Li ricevis la sakramenton de la pastra ordino la 18an de septembro 1858, en la ĉefpreĝejo de Castelfranco Veneto el la manoj de la episkopo de Treviso, Giovanni Antonio Farina (Gambellara, 1803-Vicenza, 1888, la fondinto de la monaĥinoj nomitaj *"dorotee"*, kiu post preskaŭ tri jaroj estis translokita al Vicenza en 1861). Li havis iom pli ol 23 jarojn kaj li estis unu jaron pli juna ol tiuj kiuj havis la aĝon petitan por iĝi pastro: li devis peti escepton al la Sankta Seĝo. La postan tagon, la 19an de septembro, li celebris solene sian unuan meson en Riese.

De la padova seminario li gardis ĉiam bonegan memoraĵon: en Venecio, decembre de 1894, jam kardinalo kaj patriarko, li difinis la jarnaŭon en Tombolo kiel "la jaroj plej belaj en mia vivo", ĝuste kiel Galileo Galilei taksis la periodon pasigitan en Padovo (1592-1610) "la plej belajn 18 jarojn en mia tuta vivo"[16].



*Mons-ro Giovanni Antonio Farina, kiu donis la pastran konsekron al Sarto, estis beatproklamita la 4.11.2001.*

## NOTOJ POR LA TRIA ĈAPITRO

**12** Por trovi biografiajn kaj bibliografiajn informojn pri Jacopo Monico, oni konsultu la volumojn MARCHESAN A., *Pio X nella sua vita e nella sua parola [Papo Pio la deka laŭ lia vivo kaj vortoj]*, Benziger e Co., Sankta A., Einsiedeln, 1904-05, pp. 50-57, kaj *Le visite pastorali di Jacopo Monico nella diocesi di Venezia (1829-1845) [La paŝtistaj vizitoj de Jacopo Monico tra la diocezo de Venecio]*, a cura di Bruno Bertoli e Silvio Tramontin [zorge de Bruno Bertoli kaj Silvio Tramontin], Ed. di Storia e Letteratura, Roma, 1976, p. CXCVII-407.

**13** La Kolegio Tornacense Campion estis institucio fondita de Petro di Cambio de' Boateri. Ĝi prizorgis la vivtenadon de ses klerikoj malriĉaj kiuj studadis kanonikan juron ĉe la Universitato de Padovo. Organizanto de la kolegio estis precipe Albicio dei Brancasecchi el Lucca, kanoniko de Tournai (de kie devenas Tornacensis, la unua nomo); la Kolegio estis malfermita en Padovo apud la puto nomata Campion (la dua nomo), kiu korespondas al la nuntempa CUAMM (Universitata Kolegio por Misiaj Aspirantoj Kuracistoj); ĝiaj tiel nomataj *"graziandi"* (avantaĝo-ricevantoj) devis esti loĝantoj de la diocezoj de Padovo, de Treviso, de Venecio kaj de Tournai en Belgujo. Vidu DANIELE I., *San Pio X alunno del seminario vescovile di Padova (13 novembre 1850-14 agosto 1858) [Sankta Pio la deka lernanto de la Padova episkopa seminario (13an de novembro 1850-14an de aŭgusto 1858)]*, Istituto per la Storia Ecclesiastica Padovana, Padova, 1987, p. 13 n. 7.

**14** VIAN N., *Avemaria per un vecchio prete Intermezzi aneddotici lungo la vita di san Pio X ["Saluton Maria" por maljuna pastro Anekdotaj eroj tra la vivo de sankta Pio la deka]*, Marton Editore, Treviso, 1977, pp. 5-18.

**15** ZAGGIA G., *Una raccolta di musiche sacre di Giuseppe Sarto (poi Sankta Pio X), chierico nel seminario di Padova [Kolekto de ekleziaj muzikaĵoj de Giuseppe Sarto (poste Sankta Pio la deka), kleriko en la Padova seminario]*, en *Fonti e ricerche per la storia ecclesiastica padovana [Fontoj kaj esploroj pri la padova eklezia historio]*, Antoniana, Padova, 1969, pp. 339-45.

**16** ROMANATO G., *Pio X La vita di papa Sarto [Pio la deka La vivo de Papo Sarto]*, Rusconi, Milano, 1992, p. 38.

**17** MARCHESAN A., *Pio X nella sua vita e nella sua parola [Papo Pio la deka laŭ lia vivo kaj vortoj]*, Benziger e Co., Sankta A., Einsiedeln, 1904-05, p. 110.

## Kapelano de Tombolo (novembro 1858-majo 1867)

Kiel kapelano li estis sendita al Tombolo, paroĥo en provinco de Padovo lokita ĉe la limoj de diocezo Treviso, je distanco de malmultaj kilometroj el la turgarnita urbo Cittadella (elp. Ĉitadela), la unua religia komunumo de la diocezo de Padovo.



*Giuseppe Sarto ĵus pastriĝinta. Li estis konsekrita la 18an de septembro 1858 en la katedralo de Castelfranco Veneto (Treviso) fare de mons-ro Giovanni Antonio Farina, episkopo de Treviso. Du monatojn poste li estis nomumita kapelano en Tombolo (Padovo).*

La paroĥa preĝejo, dediĉita al Sankta Andrea apostolo, altiris fidelulojn kiuj vivis en teritorio ekonomie kaj politike regata de grafo Giovanni Cittadella (elp. Ĝovani Ĉitadela).

La plejmulto de la loĝantoj de Tombolo estis makleristoj kaj brutokomercistoj.

Malgraŭ la relativa bonstato, implicita de la privata iniciato kaj de merkato unika - aŭ preskaŭ - en sia speco, tamen la malriĉeco vaste ĉeestis, ĉar en Tombolo la nova kapelano devis komenci disdoni al la plej malricaj la tritikon kiu al li apartenis pro lia pastra ofico: ili estis personoj tute bezonantaj vivtenadon, kaj li sentis ilin (laŭ la atesto de la historiistoj) kiel siajn rektajn gefratojn, kvazaŭ ili estus parto de unu sama familio, akceptante ĉiujn koneksajn ekonomiajn kaj jurajn, ĉagrenigajn problemojn.

Lia paroĥestro estis pastro Antonio Costantini (elp. Antonio Kostantini), (Cortina d'Ampezzo, 1821 - Tombolo, 1873), kiun li multfoje anstataŭigis pro lia malfirma sanstato.

Li estis paroĥestro kiu sekvis Sarton'n per la kritika okulo de paŝtisto, sentanta sian respondecon adresi al la estontaj respondecoj la pastrojn al li konfiditajn: kun li la nova pastro debatis kaj interkonsiliĝis, kaj akiris

pastran kaj paŝtistan sperton.



*La lokoj de la juneco de Pio la deka.*

En Tombolo li komenci verki predikojn, religiajn paroladojn kaj katekismajn instruadojn (ĉiuj homiliaj skribaĵoj de li verkitaj dum diversaj periodoj estis kolektitaj poste kaj binditaj en kvin volumoj, nun konservataj ĉe la Biblioteko de la seminario de Treviso). Speciale, sub la "akuŝarta" gvidado de pastro Costantini, li akiris certan oratoran famon: per iom da ironio li estis nomita *"cappellanus de cappellanis"* (la plej lerta kapelano inter la kapelanoj) ĉar, jam famkonata en la diocezo de Treviso, li estis invitata prediki fare de la aliaj parokestroj, kaj li eĉ atingis la honoran taskon eldiri en la katedralo de Treviso panegiron pri Beata Enrico (elp. Enriko) el Bolzano, kunpatrono de urbo Treviso.

En sia unua paroka komunumo li dediĉis sin ofte al la karitataj bonfaradoj, neglektante sin eĉ en la vestaĵoj kaj eĉ rezignante pri la vivonecesoj.

Li havis sian providencan, fatalisman kaj senmovisman konceptadon pri la malriĉeco kaj pri la riĉeco: per la fama funebra parolado eldirita en Cittadella (Padovo) okaze de la datreveno de la funebra rito por grafino Elisabetta Viani (24an de novembro 1863), li formulis sian teorion pri la rilato inter malriĉeco kaj riĉeco, laŭ kiu por la malriĉuloj ne estis konceptebla sociala elaĉeto, krom en la mezuro laŭ kiu ili devis permesi al la riĉuloj eniri la Regnon de la Ĉielo.

Liaj tagoj estis karakterizitaj de entuziasma aktivado: li dormis malmulte, li estis tre okupita kaj ĉie ĉeestanta, li anstataŭigis la parokestron kiam ĉi-lasta estis atakita de la malsano.

Li estis nomata *"moto perpetuo"* (t.e. ĉiamdaŭra moviĝo) pro sia senĉesa aktivado en la paroko kaj ekstere. Li estis ĉiam en rekta kontakto kun la loĝantaro ĉiutage; vespere li disdonis lecionojn de korusa kanto kaj metadis sin je dispono por instrui legi kaj skribi al la analfabetoj, kiuj estis tiam tre multenombraj.

Kaj je la fino de la tago li studadis la verkojn de Sankta Tomaso, la Sanktajn Skribojn, la eklezian juron


*Pastro Antonio Costantini*


Maklerado de brutoj en la merkato.

(kiu tiam estis nur miksaĵo de juraj normoj akumuliĝintaj dum jarcentoj).

Li enlitiĝis tre malfrue kaj dormis dum kvar horoj.

El siaj magraj gajnoj li investis nenion: la atestantoj dum la kanonikaj procesoj certigas unuanime la konstantan praktikadon de materia karitato fare de ilia kapelano. Li estis certa ke la Providenco ĉiam subtenos kaj gvidos lin, kaj sekve li donis ĉion kion li posedis, ĝis tiom ke li eĉ surprenis ŝuldojn (kiuj koncernis ankaŭ lian familion en Riese), por kies elpago li komencis koni la sidejojn de la Lombardejoj de Cittadella (Padovo) kaj de Castelfranco Veneto (Treviso), kie li lombardis sian arĝentan horloĝon. Li estis konsiderata de ĉiuj sanktulo kaj perla pastro.

Pro ĉiuj ĉi tiaj homaj karakterizoj, pastro Costantini profetis: "Baldaŭ ni lin vidos parokestron en unu de la plej gravaj parokoj en la diocezo, poste ni vidos lin kun la ruĝaj ŝtrumpoj... kaj poste... kiu scias!". *(kompreneble, la "ruĝaj ŝtrumpoj" celis indiki la episkopecon, ĉar ili estis parto de la vestaĵoj de episkopo - kaj ankaŭ de kardinalo, ndle).*

Laŭ la historia verkisto mons-ro Angelo Marchesan, kiu verkis unu inter la plej kompletaj biografioj pri Sarto (biografio kies presprovaĵoj eĉ korektis per siaj manoj la Papo aŭ lia sekretario), li neniam forgesis la periodon en Tombolo, tre gravan por lia homa kaj pastra formado: "Tombolo estis la vera profesilernado de la eklezia kariero de pastro Giuseppe Sarto, kaj pastro Costantini estis lia vera instruisto kaj estro, riĉa je doktrino kaj sperto"[17].

En 1867 li estis invitita de sia episkopo, mons-ro Federico Maria Zinelli (elp. Federiko Maria Cineli, Venecio, 1805 - Treviso, 1879), partopreni en konkurso por alpreni la pastran respondecon en unu el la kvin parokoj tiam vakantaj. La 21an de majo 1867 li estis nomumita parokestro de Salzano, en provinco de Venecio sed en diocezo de Treviso, kiu estis la plej grava el la parokoj konkursmetitaj.

Lia foriro el Tombolo estigis tuj la bedaŭron kaj nostalgion de ĉiuj tombolanoj.

## NOTO POR LA KVARA ĈAPITRO

[17] MARCHESAN A., *Pio X nella sua vita e nella sua parola [Papo Pio la deka laŭ lia vivo kaj vortoj]*, Benziger e Co. Sankta A., Einsiedeln, 1904-05, p. 110.

## Parokestro de Salzano (majo 1867-novembro 1875)

Li faris sian eniron en la parokon de Sankta Bartolomeo, apostolo de Salzano, vespere de sabato la 13an de julio 1867, sen ia ekstera festa ceremonio.

Lia karaktero ne plaĉis al la loĝantaro kaj al la lokaj eminentuloj, frontloke al la publikaj kaj la preĝejaj administrantoj, kiuj kutimiĝis havi famajn kaj longaspertajn parokestrojn. La esprimoj de malmulta aprecado kaj la murmuradoj certe ne estis ŝparitaj: laŭ la tre grava komunumo li estis tro juna (apenaŭ 32-jara), tro malmulte konata kaj malmultaj estis liaj referencoj.

Li estis tiam konsiderata pastro kun malmulta valoro, sed tre rapide ĉiuj ŝanĝis sian opinion pri li. Salzano estis eklezia komunumo kun 2282 loĝantoj, plejparte terkultivistoj, preskaŭ ĉiuj duonfarmuloj de la familio de Moisè Vita Jacur (1797-1877), izraelido, kiu havis tie vastajn bienojn.

Kiel ĉiuj historiistoj akorde substrekas, la plejmulta sindevigo de la nova kaj juna parokestro estis la katekizado de la plenkreskuloj kaj de la geknaboj.

Li starigis katekismon "laŭ dialogo", kunlabore kun pastro Giuseppe Menegazzi (Noale, 1840 - Treviso, 1917), kiu estos lia posteulo kiel parokestro de 1876 ĝis 1885. Konkreta frukto de ĉi tiu metodo estas du kajeroj mane skribitaj, kiuj enhavas 577 demandojn kaj respondojn, kaj kiujn historie valorigis mons-ro Francesco Tonolo en 1954 kaj mons-ro Giuseppe Badini en 1974[18].

Ĉi tia katekisma proceduro



*La arkipastra preĝejo de Salzano (Venecio), kie Sarto estis parokestro ekde 1867 ĝis 1875. Li estis la unika Papo kiu trairis ĉiujn ŝtupojn de la pastra servado.*



**Manuskripto de la katekismo “laŭ demandoj”.**
La unuaj frazoj tekstas:
*Oni antaŭe faru mallongan instruon kiu pruvu malebla, ke la homo donis al si mem la vivon.*
*Demando: Kiu do metis nin sur ĉi tiu mondo?*
*Respondo: Dio*
*D.: Kiucele li metis nin sur ĉi tiu mondo?*
*R.: Por ke ni povu koni, ami, servi lin dum ĉi tiu vivo, kaj poste iri ĝui Lin en Paradizo.*
*D. Ĉu vi konas Dion?*
*R.: Jes.*
*D.: Kiu estas Dio?*
*R.: La Kreanto, la mastro de la ĉielo kaj de la tero.*
*D.: Kial vi diras “Kreanto de la ĉielo kaj de la tero”?*
*R.: Ĉar Dio estas tiu, kiu faris el nenio la ĉielon kaj la teron.*
*D.: Kion signifas krei?*
*R.: Fari el nenio.*

altiris al Salzano fidelulojn de la najbaraj parokoj, kiuj pro tio ne partoprenis en la vivo de siaj preĝejoj: tio kompreneble estigis plendadojn de la parokestroj ĉe la episkopo, kiu limiĝis sugesti: “agu ankaŭ vi same!”. Kune kun la ordinara katekizado li prizorgis la Kunfrataron de la Kristana Doktrino, fonditan en 1723.

Alia aspekto pro kiu estas ĝenerale konata la pastra agado de pastro Giuseppe Sarto en Salzano estas la akcepto al la eŭkaristio de junaĝaj infanoj, ankaŭ de tiuj, kiuj apenaŭ kapablis distingi la diferencon inter la pano kiel ĉiutaga manĝaĵo kaj la pano kiel spirita nutraĵo: li plifruigis la aĝo-limon por ricevi la eŭkaristion je la 8a kaj 9a jara aĝo, dum estis kutimo preskaŭ ĝeneraliĝinta alproksimiĝi al la eŭkaristia festeno ĉirkaŭ la 12a - 14a vivojaro.

Liturgio kaj religia muziko estis por la juna parokestro de Salzano gravaj elementoj el granda intenseco kaj nedisigeble interligitaj: li restaŭris la orgenon de la 18a jarcento de Moscatelli (elp. Moskateli), poste ankoraŭ pliigita de la fama firmao Fratoj Bazzani (elp. Bacani) la 3an de novembro 1867. Vintre de 1868 li fondis vesperan lernejon por liturgia ĉanto. La



*Giuseppe Sarto fotita je la epoko kiam li estis parokestro en Salzano*

renomo akirita de la juna pastro en la muzika kampo estis rimarkinde alta, certe trans la diocezo: li estis invitita partopreni en la Unua Kongreso de la italaj katolikoj, kiu okazis en Venecio en 1874 (de la 12a ĝis la 16a de junio), sed li ne partoprenis en ĝi[19].

La pastra agado ĉe la mariala flanko realiĝis precipe rilate al la Madono de Karmelo, honorata sub la loka nomo *Madonna della Roata*. Li starigis la pian religian praktikon de la monato de majo por preĝi la Madonon (1869), kiu antaŭe ne ekzistis, kaj honoris la Madonon kun la titolo Senmakula Virgulino, komisiante altarpanelon en la preĝkapeleto metita en la parokloko Castelliviero (elp. Kasteliviero). Li kontribuis por la plivastigo de la kulto al Sankta Antono de Padovo, Sankta Luizo kaj Sankta Valenteno per la komisio de nova altarpanelo en 1870 al la venecia pentristo Petro Nordio.

Ĉe la flanko pli strikte administra, certe ne malpeza estis la mastrumado de la transiro de la politika reĝimo el la aŭstria regado al tiu de Italio, kiu ĵus eliris el la Tria Milito por Sendependeco, transdonante al Venetio la jakobenan kaj kontraŭklerikalan piemontan leĝaron.

Li depostulis tuj por sia nova paroko la postlasaĵon de sia antaŭulo, pastro Antonio Bosa (Pagnano, 1804 - Salzano, 1867), kiun li sukcesis transformi en la Pia Institucio Bosa, kun apartaj celoj favore al la honorindmoraj edzinigendaj junulinoj, al la junuloj kaj al dungado de la junuloj.

Kiel multaj venetiaj parokestroj de la 19a jarcento, li ricevis la respondecon direkti la komunumajn lernejojn: li estis fakte elektita direktoro en 1868 kaj poste vokto en 1869; interalie, dum lia paroka prizorgado, estis malfermita la porvirina sekcio de la komunumaj lernejoj, ĉar antaŭe, kiam tie estis



*Interno de la preĝejo en Salzano*

la aŭstriaj leĝsistemoj, nenia instruado por la knabinoj estis antaŭvidita. Lia prizorgo celis ankaŭ al la alfabetigo de la plenkreskuloj, por kies edukado li klopodis dumvespere.

Koncerne la agadon favore al maljunuloj kaj publika sano, li pliriĉigis la lokan civilan hospitalon nomitan *Massa Poveri* (Maso de la Malriĉuloj, unu el la malmultaj de la provinco de Venecio, fermita pro financaj kaŭzoj en 1883) kaj la kunligitan domon por maljunuloj, ambaŭ fonditajn de pastro Antonio Bosa en 1855 sekve de la testamentaĵo de pastro Vittorio Allegri (Loreggia, Padova, 1791 - Padova, 1835), parokestro en Salzano de la 28a de aprilo 1791 ĝis la 24a de oktobro 1825[20], dotante ilin eĉ per taŭgaj normoj (statuto kaj interna regularo).

Li prizorgis tute speciale la unuecon en la vilaĝo, dispartigita el civila kaj administra vidpunktoj ekde la epoko de la plurjarcenta regado de la Tre Serena Respubliko de Venecio: tiu malunueco ankoraŭ vigle persistis.

Kiel en Tombolo, ankaŭ en Salzano li dediĉis malmulte da tempo al sia nokta ripozo. Li studadis specialmaniere la verkojn de la Patroj de la Eklezio, ekzercis sin por la eklezia oratorarto kaj daŭrigis verki predikojn.

Tre utila por ekkoni ĉiujn liajn iniciatojn estas la *Registro di una cassa privata* (Registro de privata kaso), kiun li mastrumis paralele al tiu oficiala, en kiu li notis ĉiujn minimumajn enkasigitajn sumojn kaj ĉiujn plej malgrandajn elspezojn. Fakte, en tiu registro li eĉ notis interalie la mizerajn enspezojn (preskaŭ ĉiuj plukitaj per la saketo rondirigata en la preĝejo kaj en la tradiciaj kvestoj de naturvaroj, kiel tritiko, maizo, vinberoj, brulligno, koketoj, silkkokonoj, ovoj, vino) kaj ĉiujn elspezojn: el ĉi-lastaj la plej rimarkindaj kaj gravaj estas tiuj por la repago de pezega ŝuldo starigita de lia antaŭulo, pastro parokestro Antonio Bosa, kiu volis ĉirkaŭ la jaro 1843 rekonstrui preskaŭ komplete la preĝejon laŭ novklasika stilo: ĝi estis ŝuldo kiun Sarto sukcesis repagi *"usque ad ultimum quadrantem"* (ĝis la lasta monero) la 12an de decembro 1873, finpagante la lastajn ŝuldatajn 1000 lirojn al la entreprenisto Giuseppe Dal Maschio (elp. Ĝiuzepe Dal Maskjo, 1829-1889), la filo de Marco Dal Maschio (elp. Marko Dal Maskjo 1793-1870) kiu multe



*Vilao Romanin-Jacur.*
*La silkfabriko, fone, estis konstruigita en 1872 ankaŭ per la kontribuo de parokestro Giuseppe Sarto.*

*La silkfabriko de Salzano, nuntempe en aĉa kondiĉo, estis unu el la plej gravaj industrioj en Venecilando en la sektoro de la silko.*



klopodis ĉe Sarto por rericevi tion, kion oni ŝuldis al li.

Ankaŭ en la sektoro de la virina laboro pastro Giuseppe Sarto engaĝiĝis, por ke fariĝu malpli metieca kaj pli industria la loka labora agado, ligita, verŝajne jam ekde 1600, kun la prilaboro de silkraŭpo: la 26an de septembro 1872 estis fakte inaŭgurita de Moisè Vita Jacur silkfabriko en kiu laboris preskaŭ 200 junaj virinoj de Salzano. La parokestro kontribuis eĉ al la konstruado de la industria instalaĵo, per la provizado de la necesa gruzo "en la espero povi, ĉiamaniere, per la duonsenpagaj laborplenumoj de la Parokanoj, prizorgi la urĝajn bezonojn de la malriĉa preĝejo"[21].

El religia vidpunkto li ege disvastigis la praktikon de la 40 horoj da adorado de la tre Sankta Eŭkaristio dum la Sankta Semajno kaj reorganizis la Kunfrataron de la tre Sankta Eŭkaristio en 1875, ĝuste en la jaro en kiu li estis levita ĝis la rango de kanoniko de la kapitulo de Treviso. Alia celo, kiun li intencis realigi en tiu sama jaro, estis la fondo de la asocio de la Filinoj de Maria, sed la celon realigos liaj posteuloj.

Li praktikis karitaton kaj sin konfidis je la Providenco: li perfektigadis, ĉi-teme, ankaŭ en Salzano la ĉiutagan konduton kiun li jam larĝe elprovis en Tombolo, ĉar li disdonis siajn tolaĵojn, la nutraĵojn, kiujn liaj fratinoj kuiris, la brullignon, la grenon, la ŝuojn.

Multfoje li lombardis ĉe la lombardejo de Venecio sian parokan ringon, postlasitan al la parokestroj de Salzano fare de pastro Vittorio Allegri, per testamento skribita la 10an de marto 1828.

Li havis malavaran kaj impulsiĝeman karakteron, kiun li sukcesis tamen ĉiam regi. En 1869 li suferis proceson dum kiu tamen li estis deklarita senkulpa; male, estis kondamnitaj kelkaj parokanoj kiuj alkuris helpe al li. Iuj personoj, kiuj ekdisputis kun la parokestro de Salzano posttagmeze de dimanĉo la 27an de junio, denuncis al la aŭtoritatuloj, ke ili ricevis agreson: la celo estis impliki lin en la bedaŭrinda akcidento. Sarto eltiriĝis kun ĉiuj honoroj; li konservis dankemon por ĉiuj kiuj alkuris por defendi lin, kondamnitaj, post la proceso celebrita la 23an kaj la 24an de decembro 1869, al prizonpunoj konfirmitaj dum apelacio la 25an de januaro 1870[22].

Aliaj eventoj, kiujn la atestantoj pli ofte menciis dum la kanonikaj procesoj por sanktproklamo de Giuseppe Sarto, koncernas la ĥoleron kiu en 1873 atakis (kiel jam en 1836, en 1847 kaj en 1855) la komunumon kaj la parokon de Salzano. La parokestro elmetis sin mem je la risko, sen zorgi pri sia vivo. Tre signifajn spurojn de lia spirita partopreno en la tragedio kiu kuntrenis liajn parokanojn oni kaptas en la parokaj registroj pri la forpasoj. La plej grava okazo de lia kuntrenado aperas el la legado de la mortaktoj pri du junaj geedzoj, Vittorio Gambaro (elp. Vitorjo Gambaro) kaj Giuditta Bottacin (elp. Ĝudita Botaĉin), respektive 21- kaj 20-jaraj. Vittorio Gambaro mortis pro ĥolero, kaj lia forpaso estis registrata en la parokaj aktoj. Post malmultaj horoj tamen mortis ankaŭ la junega edzino. Tiel la parokestro transdonis al la posteuloj la okazintaĵon, kune kun mesaĝo de kristana kredo kaj espero: “Kompatinda edzino! asistante senlaca ĉe la lito de la edzo Gambaro Vittorio estis trafita de la morbo kiu en nuraj 5 horoj ŝin atingigis la edzon. Kaj tiel tiuj kiujn la amo kunigis dum la vivo *et in morte non sunt divisi. Sit perpetua animabus benedictis requies”* (traduko de la latinaj vortoj: eĉ ĉe la morto ne estas disigitaj. Estu senfina ripozo al la benataj animoj).

La ega aktivado kaŭzis al li rimarkindan fizikan elĉerpiĝon tiel ke oni timis pro lia sanstato, sed li sukcesis supervenki ankaŭ ĉi tiun elprovon.

Li forlasis la parokon de Salzano la 16an de septembro 1875; tamen la lastaj oficialaj aktoj de la transdonoj de la parokaj deponaĵoj estis subskribitaj la 26an de novembro 1875, kiel evidentiĝas el la parokaj registroj.

*En Salzano estas Muzeo dediĉita al Pio la 10a. La Muzeo estis tute refarita antaŭvide al la Granda Jubileo de la jaro 2000 kaj inaŭgurita la 3an de oktobro 1999. Ĝi entenas multajn memoraĵojn de Papo Sarto, inkluzive de la objektoj de li donacitaj “al sia paroko”.*
*Alia Muzeo dediĉita al Pio la 10a estas en Tombolo.*



# NOTOJ POR LA KVINA ĈAPITRO

**18** TONOLO F., *Come da parroco Pio X insegnò il catechismo Il catechismo manoscritto di don Giuseppe Sarto [Kiel Pio la deka, kiam estis parokestro, instruis katekismon La mane skribita katekismo de pastro Giuseppe Sarto]*, en "Catechesi", XXIII (1954), pp. 367-376. *Testi e documenti di vita spirituale e azione pastorale [Tekstoj kaj dokumentoj de spirita vivo kaj pastista agado]*, a cura di BADINI G. [zorge de BADINI G.], anno XXI, in l'*Annuario del parroco [Jarlibro de la parokestro]*, Edizioni Paoline, Roma, 1975, pp. 101-225; pp. 337-345.

**19** NIERO A., *Esperienze e riforme liturgiche [Liturgiaj spertoj kaj reformoj]*, in AA. VV., *Le radici venete di San Pio X Saggi e ricerche [La venetiaj radikoj de Sankta Pio la deka Eseoj kaj esploroj],* a cura di Silvio Tramontin [zorge de Silvio Tramontin], Morcelliana, Brescia, 1987, p.52.

**20** Viktoro Allegri estis escepta pastra personeco, ankoraŭ ne tute bone komprenita el la historia kaj eklezia vidpunkto. Por kelkaj ekkonaj alproksimiĝoj, oni konsultu BACCHION E., *Salzano Cenni storici [Salzano Historiaj signoj]*, represo prizorgita de la Komunuma Administracio de Salzano, kun enkonduka noto de Silvio Tramontin kaj bio-bibliografia eseo de Quirino Bortolato, Amministrazione Comunale di Salzano, Multigraf, Spinea, 1986, pp. 65-66, 75; BACCHION E., *Pio X Giuseppe Sarto Arciprete di Salzano (1867-1875) Nella tradizione e negli atti di archivio parrocchiale e comunale [Pio la deka Giuseppe Sarto Cefpastro de Salzano (1867-1875) En la tradicio kaj en la aktoj de la paroka kaj komunuma arkivoj]*, kun kompletigaj notoj kaj indeksoj zorge de prof-ro Quirino Bortolato, Amministrazione Comunale di Salzano con il patrocinio della Fondazione Giuseppe Sarto, Multigraf, Spinea, 1996, p. 214 s 112; AA. VV., *La Casa di Riposo "Don Vittorio Allegri" dalle origini ai giorni nostri [La maljunulejo "Pastro Viktoro Allegri" de siaj originoj ĝis niaj tagoj]*, Studiostampa - Tipo-offset "La Commerciale", Piombino Dese, 1974, p. 158.

**21** BACCHION E., *Salzano Cenni storici [Salzano Historiaj signoj]*, represo prizorgita de la Komunuma Administracio de Salzano, kun enkonduka noto de Silvio Tramontin kaj bio-bibliografia eseo de Quirino Bortolato, Amministrazione Comunale di Salzano, Multigraf, Spinea, 1986, pp. 112-116; BACCHION E., *Pio X Giuseppe Sarto Arciprete di Salzano (1867-1875) Nella tradizione e negli atti di archivio parrocchiale e comunale [Pio la deka Giuseppe Sarto Ĉefpastro de Salzano (1867-1875) En la tradicio kaj en la aktoj de la paroka kaj komunuma arkivoj]*, kun kompletigaj notoj kaj indeksoj zorge de prof-ro Quirino Bortolato, Amministrazione Comunale di Salzano con il patrocinio della Fondazione Giuseppe Sarto, Multigraf, Spinea, 1996, pp. 93-95.

.**22** [BACCHION E.], *Un aneddoto della vita del Parroco Sarto[Anekdoto de la vivo de Parokestro Sarto]*, in *Salzano al suo pastore In commemorazione del giubileo sacerdotale di Mons. Arciprete [La paroko de Salzano al sia pastisto En memoriga festo de la pastra jubileo de mon-ro Cefpastro]*, Salzano, 18 agosto 1946, Eugenius Bacchion junior curavit, Stamperia Marciana, Venezia, 1946. Oni konsultu ankau BACCHION E., *Pio X Giuseppe Sarto Arciprete di Salzano (1867-1875)*, *Nella tradizione e negli atti di archivio parrocchiale e comunale [Pio la deka Giuseppe Sarto Cefpastro de Salzano (1867-1875) En la tradicio kaj en la aktoj de la paroka kaj komunuma arkivoj]*, kun kompletigaj notoj kaj indeksoj zorge de prof-ro Quirino Bortolato, Amministrazione Comunale di Salzano con il patrocinio della Fondazione Giuseppe Sarto, Multigraf, Spinea, 1996, pp. 72-73.

## Kanoniko en Treviso (novembro 1875 - novembro 1884)

Li estis pli ol kvardekjaraĝa kiam li ekoficis en Treviso, sur sia kanonika ĥorseĝo en la Katedralo la 28an de novembro 1875, la unuan dimanĉon de Advento.

Alvokita de episkopo Zinelli, li plenumis sian tre intensan aktivadon dividante ĝin inter la katedralo, la episkopa kurio kaj la seminario; sed li ne preterlasis engaĝiĝon ankaŭ favore al la Trevisa Katolika Movado, kiu tiam movis siajn unuajn paŝojn: ekde la jaro 1892 li donis grandan kaj pravan instigon al la katolikaj Kamparaj Ŝparkasoj kaj disvastigos, en la gazeta agadkampo, katolikan informadon per la periodaĵoj *L'Eco del Sile* (*L'Eĥo de Sileo*, 1878-82) kaj *Il Sile* (*Sileo*, 1883-1885), kiuj post kelka tempo fariĝos *La Vita del Popolo (La Vivo de la Popolo)*, fondita en 1892.

Li estis precipe episkopa kanceliero, spirita direktoro de la seminario kaj rezida kanoniko: la historia verkisto Marchesan fakte rimarkigis eĉ lian ĉeeston en la Eklezia Tribunalo kiel konsiliano kaj kiel prosinoda ekzamenisto.

Dum la treviza periodo, do, li havis la eblecon enprofundiĝi pli kaj pli bone en la plektaĵojn de la kanonika juro kaj koni profunde la problemojn de la seminaria rondo.

Kiel fama oratoro li daŭre estis invitata; kiel katekisto li zorge daŭrigis laŭ la spertoj kiujn li akumulis dum la



*Mons-ro Giuseppe Sarto (tria dekstre, duavice) spirita patro de la seminario, episkopa kanceliero kaj kanoniko en Treviso. Ĉi tiu foto koncernas la lernejan jaron 1875-1876 kaj ĝi montras Sarto'n kun la episkopo mons-ro Zinelli kaj mons-ro Pietro Jacuzzi, profesoro kaj rektoro de la seminario de Treviso, iama kapelano de Riese, kiu gvidis Sarto'n al pastreco.*





*Mons-ro Sarto, kanoniko de Treviso. Ĉi-alte: la Katedralo, la episkopejo kaj la episkopa kurio de Treviso.*

jarnaŭo en Tombolo kaj en Salzano (li kunportis en Treviso la du katekismajn kajerojn kiujn li verkis en Salzano) kaj en la ekleziaj fakoj li daŭre ĝisdatigis siajn konojn, aparte tiujn pri eklezia muziko (en 1882 li partoprenis en la muzika kongreso honore al Guido el Arezzo).

Ĉirkaŭata, malgraŭ la relative juna aĝo, de la estimo de siaj kunfratoj, kiel agnosko de sia pastra valoro li estis elektita ĉefkanoniko de la kapitulo la 12an de junio 1879 kaj, post la morto de episkopo Zinelli, nur 44-jara li fariĝis Kapitula Vikario: li estris tial, de la 27a de novembro 1879 ĝis la 26a de junio 1880, la 210 parokojn kaj la ĉirkaŭ 350.000 fidelulojn de la trevisa diocezo.

Dum preskaŭ naŭ jaroj da agado favore al la Eklezio de Treviso li servadis tri episkopojn: Federico Maria Zinelli (de 1875 ĝis 1879), Giuseppe Callegari (de 1880 ĝis 1883), kaj Giuseppe Apollonio (en 1883 kaj 1884). En septembro 1884 atingis lin la sciigo ke li estis elektita episkopo de Mantovo, kaj la postan 16an de novembro 1884 li estis konsekrita episkopo en Romo, en la preĝejo de Sankta Apollinare, fare de la mantova kardinalo Lucido Maria Parocchi (Elp. Luĉido Maria Paroki, Mantova, 1833-Roma, 1901), vikario de Papo Leo la 13a por urbo Romo.

## Episkopo de Mantova (novembro 1884-junio 1893)



Kvin monatojn pli poste, la 18an de aprilo 1885, li faris sian solenan eniron en la diocezo de Mantova: "malfacila" diocezo, kiun Gianpaolo Romanato difinis "drivanta diocezo"[23].

Jam du "nekompromisemaj" episkopoj ne sukcesis kiel pastraj gvidantoj de tiu diocezo: mons-ro Pietro Rota (Sankta Prospero, Reggio Emilia, 1805 - Romo, 1890) episkopo ekde1871 ĝis 1879, kaj mons-ro Giovanni Maria Berengo (Venecio, 1820 - Udine, 1896) ekde 1879 ĝis 1884. La unua rezignis kaj la dua estis "promociita" al la episkopa sidejo de Udine.

La urba medio estis karakterizita de disvastiĝinta ateismo, sekteco, "kolera" kontraŭklerikalismo, instigataj de la aktiva ĉeesto de la framasonaro. Plie, la klerulaj rondoj estis trapenetritaj de ideoj inspiritaj de sciencismo, raciismo kaj pozitivismo.

La vicestro de la itala pozitivismo, Roberto Ardigò (1828-1920), profesoro en la mantova seminario kaj kanoniko, ekspastriĝis en 1871. Ĉi tiu estas la kazo plej konata kaj signifoplena, sed jam en la antaŭa jaro 10 sacerdotoj forlasis la pastran veston.

Sarto senprokraste aktivis por restarigo de la seminario, post la kelkjara fermo (de 1870 ĝis 1880). Jam en 1886 la zorgoj de mons-ro Sarto rikoltis la unuajn fruktojn.

Alia tuj enfokusigita celo estis la "rekonstruo" de la lokaj parokaj komunumoj el eklezia vidpunkto laŭ la paŝtistaj gvidlinioj, kiujn li sukcese realigis, ankaŭ surbaze de siaj antaŭaj vastaj spertoj en Venecilando: unuarangis aktiva kaj intensa sakramenta vivo kaj instruado de la kristana doktrino. Ĉi tiu rekonstruo el religia vidpunkto kuntrenis influojn ankaŭ

sur la mantova civila societo - tiam turmentoplena pro la anarki-socialisma movado nomita “La boje” - per la provo refondi la Kristanan Societon (*Societas Christiana*) por la revivigado de la aktivadoj kiuj pli aŭ malpli evidente esprimis evangeliajn inspirojn.

La 18an de aŭgusto 1885 la nova episkopo anoncis la Paŝtistan Viziton de la diocezo (la dua estos tiu de la 25a de majo 1889). Variaj estas la ekleziaj sektoroj en kiuj distingiĝis lia religia kaj reformema agado.

En la sektoro de la katekizado kaj de la kristana doktrino, jam la 12an de oktobro 1885 li preskribis, ke en ĉiuj parokoj estu fondita la Lernejo de la Kristana Doktrino, kaj ke en ĉiuj dimanĉoj kaj en la devigaj festoj oni instruu la katekismon al la popolo kaj al la geknaboj. Multfoje li mem klarigis la katekismon, anstataŭigante tiun parokestron, kiu estis pro iu kaŭzo malebligata, aŭ en la parokoj kiuj estis sen pastro, kaj li viglis diligente por konstati persone *ĉu* kaj *kiel* estis disdonata la katekisma instruado en la parokoj.

Alia sektoro en kiu lia aktiva reformema interveno realiĝis estis tiu de la liturgia muziko, ĉar tia muziko, en Mantovo kiel en Venecilando, estis je nivelo de teatra kaj melodrama stilo. La 15an de oktobro 1887 li maldungis ĉiujn kantistojn de la katedralo kaj fondis la lernejon de la seminariaj kantoroj. Iom antaŭ la fino de sia episkopeco en Mantovo li renkontis la tre junan komponiston pastron Lorenzo Perosi (elp. Lorenco Perozi, 1872-1956), kiu al li parolis pri la muziko de la renoma abatejo de Solesmes, la franca benediktana centro por liturgia renoviĝo kaj por la progresigo de la gregoria kanto. Kiel episkopo, li rekomendis ĉi tiun lastan kantotipon, penante igi ĝin popola por ke ĝi estus kantata dum la liturgiaj celebroj.

Multon oni skribis pri ĉi tiu decido, sed jen lia koncerna penso: “La rekomendenda temo estas la Gregoria Ĉanto, kaj speciale la maniero kanti ĝin, kaj igi ĝin popola. Ho! Se oni



*Interno de la Katedralo de Mantova.*



*La Episkopejo de Mantova*

povus sukcesi ke ĉiuj fideluloj, kiel ili kantas la *Loretanajn Litaniojn* kaj la *Tantum Ergo*, tiel same ili kantu la fiksajn partojn de la Meso: *Kyrie*, *Gloria*, *Credo*, *Sanctus*, *Agnus Dei*. Ĉi tiu estus laŭ mi la plej bela el la konkeroj de la Liturgia Muziko, ĉar la fideluloj, partoprenante vere en la Sankta Liturgio, konservus la pietaton kaj la devotecon". La saman koncepton li rekonfirmis kelkajn jarojn pli poste. "Mi imagas", li skribis al mons-ro Giuseppe Callegari dum la Venecia periodo, kiam li jam primeditis pli profondan strategion "milojn da voĉoj kiuj kantas en kampara preĝejo la meson de la anĝeloj [...] kaj mi restas ravita, ĉar instigas min ĉiam al pietato kaj devoteco la kantoj de la popolo de *Tantum Ergo*, *Te Deum* kaj *Litanioj,* kaj mi preferas ilin anstataŭ la polifoniajn muzikojn, kiuj ne estus bone kondukitaj"[24].

Jam en Mantovo li avertis kontraŭ tiu pensmovado kiu estos nomata Modernismo: la 7an de februaro 1887 li admonegis kontraŭ tiuj kiuj "kvankam ili konas supraĵe la sciencon de la religio kaj malpli multe ĝin praktikas, tamen pretendas konsideri sin estroj kaj deklaradas [...], forgesinte la antikvan frenezon de la Kruco, [ke] la dogmoj de la kredo devus konformiĝi al la postuloj de la nova filozofio". Temas pri la filozofio, kiun proponis la angla jezuito George Tyrrell (1861-1909) kaj la franca pastro Alfred Loisy (1857-1940), ekzegezisto kaj historiisto pri religioj. La Modernismo trovis poste en Italio sekvantojn el rimarkinda graveco: ĉi tiu fenomeno estas esplorenda per plej granda senpartieco, sed estas grava ĉar ĝi altiris la atenton, inter aliaj, de rimarkindaj personoj, kiel pastroj Romolo Murri (1870 - 1944) kaj Ernesto Buonaiuti (1881 - 1946), la roma

verkisto Antonio Fogazzaro (elp. Antonjo Fogacaro, 1842-1911), la liguria barnabano Giovanni Semeria (1867 - 1931), Giovanni Genocchi (1860 - 1926), la roma juĝisto Adolfo Lepri (1881 - 1948), de Mario Augusto Martini (1885 - 1962) kaj Guido Manzelli (1888 - 1960).

La antaŭenpuŝo por la reformo de la diocezo kuntrenis ankaŭ la kunvokon de dioceza sinodo, kiu en tiu diocezo de Mantovo ne okazis ekde preskaŭ du jarcentoj: anoncita la 16an de februaro 1887, ĝi okazis de la 10a ĝis la 12a de septembro 1888; per ĝi la mantova diocezo havigis al si *Magna Charta* (Granda Ĉarto), kiu ĝisdatigis ĝian religian vivon kaj forprenis ĉion, kio senorde akumuliĝis de la 18a jarcento ĝis 1887, sen ke neniu episkopo faru la necesajn paŝtistajn elektojn.

Sarto donis agospacon al la Katolika Agadmovado, kaj havis rolon rimarkindan kaj decidan en la kreo de la Itala Katolika Unuiĝo pri Sociaj Studoj, fondita en Padovo la 29an de decembro 1889 fare de mons-ro Giuseppe Callegari, de la trevisa ekonomikisto Giuseppe Toniolo (Treviso, 1845-Pisa, 1918) kaj de la bergamano Stanislao Medolago Albani (Bergamo, 1851-1921).

Li invitis siajn parokestrojn iĝi senlacaj iniciatintoj de la ofta kaj ĉiutaga komuniiĝo, kun speciala prizorgo favore al akcepto de la geknaboj en la eŭkaristia festeno.

Li havis personan kaj specialan sentemon por la problemoj de elmigrado, kiu en la jaroj 1880-90 malplenigis la italajn kamparojn: li klopodis bremsi la ondojn da migrantoj vojaĝantaj al la landoj trans la atlantika oceano kaj pli foren, kaj, kiam li ne sukcesis, li strebis por ke la parokoj restu proksimaj al siaj foraj, migrintaj parokanoj.

Kiel en Venecilando, ankaŭ en Mantovo li havis simplan vivon: senedzaj fratinoj prizorgis la hejmajn mastrumadojn. Li estis ĉiam proksima al la malriĉuloj per frata, materia helpo, sed li



*1910: venecilandaj elmigrantoj forveturantaj el stacidomo. Inter 1876 kaj 1987, elmigris por trovi laboron 26.706.581 italoj. La plej vasta ondo okazis dum la unuaj 10 jaroj de la 20a jarcento, kiam elmigris 6.026.690 italoj.*

akceptis ĉiujn ĉiam, sendistinge pri socia klaso kaj havaĵo.

Dum la preskaŭ naŭ jaroj kiujn li pasigis en Mantovo, lia agado montris bilancon tre pozitivan: la diocezo estis restarigita, kun fortaj radikoj sur renovigitaj bazoj. La paŝtista agado de Sarto, al kiu oni rigardis per kreskanta admiro, ricevis aprobojn kaj honorojn: sur la episkopo Sarto fakte "viglis" en Romo vere eksterordinara observanto, tio estas la mantova kardinalo Lucido Maria Parocchi, la vikario de Papo Leo la 13a, tiu kiu lin sankciis kiel episkopo. Ĉi tiu kardinalo difinis Sarto'n "la plej bona episkopo en Lombardio". Li estis proponita kiel kandidato al la kardinaleco. Li rifuzis. Sed la papa Ŝtatsekretario, kardinalo Mariano Rampolla del Tindaro, komprenigis al li ke, se li ne ŝanĝos opinion, tio eble kaŭzus fortan ĉagrenon al la Papo. Kaj sekve li akceptis. La honoro apartenis al li do pro la meritoj akiritaj "surkampe" en Mantovo, kaj ne ĉar li fariĝos patriarko de Venecio, urbo kiu tradicie estis kardinala sidejo. Li estis elektita kardinalo de Mantovo, kun la paŝtista titolo de *Sankta Bernardo "alle Terme"* (ĉe la Termusoj), dum la nepublika konsistorio de la 12a de junio 1893, kaj tri tagojn poste, la 15an de junio, li estis levita al la patriarkejo de Venecio. La sidejo estis vakanta dum 18 monatoj post la morto de kard. Domenico Agostini, patriarko de 1877 ĝis 1891, pro la rifuzo de multaj proponitaj episkopoj. Sarto tamen devis atendi ankoraŭ 15 monatojn antaŭ ol povi konkretigi la posedon: la reĝa *Exequatur* (latinlingve por: plenumu, realigu aŭ efektiviĝu tiel) ne alvenis. La rajto nomumi la episkopon de Venecio - kiu, laŭ koncedo de la Papoj, apartenis ekskluzive al la Imperiestroj de Aŭstrio - estis depostulita por la reĝo de Italio fare de la itala ĉefministro Francesco Crispi, post kiam Venecilando fariĝis itala teritorio. Ĉi tiu depostulo - kunlige kun aliaj motivoj - starigis malfruon por la havigo de la *Exequatur*.

Nur la 5an de septembro 1894 la itala reĝo subskribis la koncernan dekreton, kaj la 24an de novembro 1894 Sarto povis enoficiĝi sur la patriarka katedro de Sankta Lorenzo Giustiniani (elp. Lorenco Ĝustiniani). La Venecianoj akceptis lin per grandaj festaj ceremonioj: eble mankis nur la administrantoj de la laguna urbo, kiuj havis liberalan-demokratan politikan tendencon: ili tenis fermita pro la okazo la komunuman palacon.

## NOTO POR LA SEPA ĈAPITRO

**24** Oni trovas ambaŭ citaĵojn en DAL-GAL G., *Il papa santo Pio X Vita ufficiale della Postulazione per la Causa di Canonizzazione [La Papo sankta Pio la deka Oficiala biografio de la Postulatorejo por la Proceso de Kanonizado]*, Il Messaggero di Sant'Antonio, Padova, 1954, pp. 56-57.

## Kardinalo, patriarko de Venecio (1893-1903)



Preskaŭ unu jaron post lia eniro, en 1895, en Venecio okazis la komunumaj balotoj, kiuj kondukos al la formado de *Giunta Grimani* (elp. ĝunta grimani, magistrato gvidata de Grimani). Al ĝia balotvenko kontribuis la agado de la nova patriarko: la nova regantaro, kiu regos la urbon ĝis decembro 1919, konsistis el reprezentantoj de la grupo de katolikoj kaj de moderaj politikistoj gvidataj de grafo Filippo Grimani (elp. Filipo Grimani), kaj ĝi konsistigis antaŭigon de tiu escepta kaj ekzaltanta sezono de la itala katolikismo kiu, dum la periodo de la regado de Giovanni Giolitti (elp. Ĝovanni Ĝoliti), kondukis al laŭgrada malefiko de *"non expedit"* (elp. non ekspedit, t. e. "maloportunas" - *ĝi estis malpermeso por katolikoj aktivi en politiko*) de Pio la 9a, kaj al la Pakto Gentiloni (elp. Ĝentiloni) (de 1913, *politika alianco de katolikoj*).

El la paŝtista vidpunkto, la venecia periodo lokiĝas mezvoje inter la episkopa paŝtista instruo en Mantova kaj la universala paŝtista instruo de la dek unu jaroj da papado: estis reprenitaj, plivastigitaj, aktualigitaj kaj pliprofundigitaj ĉiuj temoj jam pritraktitaj en Mantova, la samaj, kiuj poste estos portataj kiel riĉaĵo al la tuta universala Eklezio.

La katekisma instruado kaj la predikado en Venecio estis malbone organizataj kaj kun celoj entute ne bone difinitaj; la *sankta elokvento* estis tribunusa kaj retorika, preskaŭ profana. Tial, la nova patriarko, kiel unua ago de la Venecia periodo, ne povis ne interveni ĉi-teme: la 17an de januaro 1895, li ordonis la starigon de lernejo de katekizado kaj la formadon de la katekistoj, ne nur por la apostola aktivado en la ekleziaj asistfondaĵoj, sed ankaŭ por la komunumaj lernejoj. Kiel en Mantova, li ofte plenumis kelkan *rapidviziton* por rimarki *ĉu* kaj *kiel* liaj direktivoj estis aplikataj, speciale



*Solena eniro de patriarko Sarto en Venecion (24.11.1894)*

rilate al la "spirito de kompato, ardo de karitato, la religia scienco kaj serioza sinpretiĝo".

Por la seminario kaj la klerikaro li volis disciplinan kaj sciencan organizadon, kiuj estu taŭgaj je la epoko; li renovigis la profesoraron, reformis la studkursojn, fondis en 1902 la fakultaton pri kanonika juro (kies agado daŭris ĝis 1932) por doni al siaj pastroj sufiĉan konon pri la juraj problemoj. Li volis krome ke ili partoprenu ĉiujare, kune kun li, en kurso de spiritaj ekzercoj kaj ke ili vizitu prelegojn pri biblia ekzegezo, pri kristanaj historio kaj arkeologio.

Li prizorgis homajn rilatojn prefere kun la malriĉuloj, estis senlaca konfesprenanto, malfermita al la konvertiĝo de la nekredantoj, katekisto de gejunuloj kaj geknaboj.

Per la paŝtista letero de la unua de majo 1895 li redeklaris per sia aŭtoritato, ke la kanto kaj la muziko havas la plej altan celon esti "liturgia preĝo". La precipaj karakterizoj devis esti konformaj kun la sankteco de la kanto, kun la taŭgeco de l' arto, universaleco de la religia sento kontraŭ la "teatrecaj modoj". Li indikis en la gregoria ĉanto, en la polifonio laŭ Palestrina kaj en la preĝo kantata de la popolo la majstrajn vojojn por la reformo de la liturgia muziko.


La 21an de majo li anoncis la paŝtistan viziton (kiun li daŭrigis ĝis 1898) kaj ekstaris, kiel en Mantova, plian fojon kontraŭ la moderna Kristanismo (t. e. Modernismo).

Evento tute nova (kaj tute Venecia kiel projekto) estis la 19a Eŭkaristia Kongreso (samtempe kvina nacia itala Kongreso)[25], kies "ĉefa akcelanto" estis la patriarko de Venecio. La motivon donis profanado kiu okazis en la preĝejo de la Senŝuaj Karmelanoj. La 6an de aprilo 1895 sakrilegia mano forportis hostiujon disperdante le hostion tra la stratetoj. "Por fari agon de reparacio al Jesuo sakramenta, por la mondo kiu lin malkonfesas", la patriarko anoncis tuj Eŭkaristian Kongreson kiu estis celebrata du jarojn poste, inter la 8a kaj la 12a de aŭgusto 1897.

Li malŝparis sin por pligrandigi en la fideluloj la amon por la Eŭkaristio, por kreskigi ĝin en la popolo pere de la ofta kaj ĉiutaga komuniiĝo; denove

li instigis la parokestrojn allasi al tiu sakramento la geknabojn, sen zorgi tro multe pri la aĝo, kondiĉe ke ili estu sufiĉe kosciaj pri la paŝo, kiun ili faros.

La 1an de novembro 1897 li anoncis la 29an sinodon de la Venecia Eklezio, kiu estis celebrata de la 8a ĝis la 10a de aŭgusto 1898, kun la celo igi ĝin pli adhera al la necesoj de la novaj tempoj, pro la fakto ke la antaŭekzistanta normaro datiĝis de 1865, la jaro en kiu ĝi estis promulgita de kard. Giuseppe Trevisanato (elp. Ĝuzepe Trevizanato), patriarko de 1862 ĝis 1877.



*4an de aŭgusto 1904, kardinalo Sarto suriras monton Grappa por beni la kapeleton kaj la statuon de la Dipatrino.*

Rilate al la Katolika Movado, laŭ la linio eldirita en la Kongresoj de Lodi (1890) kaj de Vicenza (1891), li volis ke la katolikoj engaĝitaj en la sociala kampo estu tre celkonsciaj pri la frata agado per disciplino, obeemo, abnegacio fronte al la paŝtistoj[26]. Li plutenis ĉiam konduton *super la partioj*, klopodante ĉiam peri la diversajn starpunktojn kaj invitante ĉiam la senkompromisajn subtenantojn de la Institucio de la Kongresoj kaj tiujn de la partia frakcio de pastro Romolo Murri, nomata demokrata-kristana, konduki politikan sindevigon kiu estu kongrua kun la anonco de frateco kaj kun la instruo de la Eklezio, eĉ se li sentis sin multe pli proksima al la unuaj pro sia *forma mentis* (mensa strukturo, pensmaniero) kaj sacerdota formiĝo.

Koncerne la socialan problemaron li invitis la personojn rigardi al Kristo-laboristo kaj aktivi por trovi, dum malkonsento, akordon inter salajratoj kaj labordonantoj. Pli ol grandaj brilaj ideoj aŭ teoriumadoj (laŭ la pensmaniero de Leono la 13a, ĝuste por klarigi), li pledis por la praktikaj intervenoj, bone pristuditaj kaj "alcelitaj", kiuj povu teni je distanco la socialismajn ideojn: li donis tial impulson al la lernejo, kie oni instruis la faman brodaĵon *punto di Burano* (t.e. farata la en venecia insulo kiu famiĝis pro tiu ĉi teksil-arto) kaj kiu laborigis 400 junulinojn, kontribuante al emancipiĝo de la virinoj; li viglis kontraŭ uzurado por la starigo de la parokaj laboristaj kasoj, la kamparaj ŝparkasoj kaj la Banko de Sankta Marko; li akcelis la Societojn de Reciproka Helpo (asekuroj kontraŭ la malsanoj), kuraĝigis la sekretariaton de la popolo por la asistado al



Papo Leo la 13a

laboristoj kaj al elmigrintoj.

Dum la dua Kongreso de la Katolika Unuiĝo de la fakuloj pri socialaj sciencoj de Padovo (26an-28an de aŭgusto 1896) li adresis al la ĉeestantoj tute paŝtistan kaj religian paroladon, kies komenco kaj fino estis solena *Sia lodato Gesù Cristo* (Estu laŭdata Jesuo Kristo). Tiu parolado esprimis lian konsideron pri la socialaj problemoj, bazitajn sur la certeco pri "l'ortodokseco de la doktrinoj kiuj estos pritraktitaj per la prudentoj la plej rigoraj de la kristana scienco, en la plej pura aliĝo al la katolika kredo kaj en la plej perfekta dependiĝo de la Eklezio, en kiu daŭras kaj disvolviĝas la vivo kaj la doktrino de Jesuo Kristo"[27].

Ankaŭ kiel patriarko, rilate al la persona materia karitato, li estis ĉiam la kutima Giuseppe Sarto: li ne limiĝis disdoni per ĝusta mezuro, sed li daŭrigis seniĝi pri ĉio "malavare".

Kvankam kelkaj historiistoj emfazis la provincialecon kaj la mensan mallarĝecon de liaj paŝtistaj agadoj, la venecia episkopo estis multe estimata ankaŭ en Romo: li ne estis certe nekonata paŝtisto, ĉar li estis konsiderata la "gemo de la Sankta Kolegio" (t.e., de la kardinalaro) kaj Leo la 13a esprimis la deziron alvoki lin al Romo por ke li estu lia vikario.

## NOTOJ POR LA OKA ĈAPITRO

25 La celebrado de la italaj eŭkaristiaj Kongresoj komenciĝis en Napolo en 1891; la postaj Kongresoj okazis en Torino (1894), en Milano (1895), en Orvieto (1896) kaj en Venecio (1897) - la lasta de la 19a jarcento. Ĝis 1920 ili neniam okazis: tia interrompo okazis pro la manko de itala organiza komitato kaj pro la unua mondmilito. Tial dum la papregado de Pio la 10a, kiu eĉ estis nomata la Papo de l' Eŭkaristio, estis organizata neniu itala eŭkaristia manifestacio je nacia nivelo, kontraŭe okazis kelkaj Kongresoj je internacia nivelo (Angoulême, 1904; Kolonjo, 1909; Madrido, 1911; Malto, 1913).

26 ROMANATO G., *Giuseppe Sarto e il movimento cattolico [Giuseppe Sarto kaj la katolika movado]*, in AA. VV., *Le radici venete di San Pio X Saggi e ricerche [La venetiaj radikoj de Sankta Pio la deka Eseoj kaj esploroj]*, zorge de Silvio Tramontin, Morcelliana, Brescia, 1987, p. 125.

27 Unione Cattolica per gli Studi Sociali in Italia, *Atti e documenti del secondo Congresso Cattolico Italiano degli studiosi di Scienze Sociali tenutosi in Padova nei giorni 26, 27, 28 agosto 1896 [*Katolika Unuiĝo por la Socialaj Studoj en Italio *Aktoj kaj dokumentoj de la dua itala Katolika Kongreso de la fakuloj pri Socialaj Sciencoj dum la tagoj 26a, 27a, 28a de aŭgusto 1896]*, Tipografia del Seminario, Padova, 1897, p. 108.

## Papo Pio la 10a (4an de aŭgusto 1903-20an de aŭgusto 1914)



Post la morto de Leo la 13a, la 20an de julio 1903, kardinalo Sarto forveturis al Romo la 26an de la sama monato. Al la Venecianoj kiuj alkuris al la stacidomo por lin saluti, li certigis: "aŭ vivanta aŭ mortinta mi revenos!".

La *papigeblaj* estis kardinalo Mariano Rampolla del Tindaro, ŝtata Sekretario de Leo la 13a, kaj kardinalo Gotti: sed la tempoj estis jam maturaj por *novspeca* elekto. Al kardinalo Rampolla oni povas apliki spican konsideron de la sama Leo la 13a [kiun rakontis Ernesto Vercesi (elp. Verĉezi) en sia libro pri la Papoj], al kiu oni demandis kial do "kardinalo Consalvi ne ricevis voĉdonojn en la konklavo kunvokita post la morto de Pio la 7a, malgraŭ la grandaj servoj kiujn li donis al la Eklezio?". Papo Leo respondis: "Consalvi dauris eĉ tro multe". Ankaŭ en la kardinala kolegio estis multaj kiuj deziris novan orientiĝon: en 1903 oni preĝpetis papon kiu permesu tiun eklezian evoluon, kiun oni perceptis"[28].

Kardinalo Sarto eniris la konklavejon en la posttagmezo de la 31a julio kaj, post kiam la unuaj voĉdonadoj evidentigis radikalajn kontraŭmetojn de starpunktoj, li estis submetita al pli kaj pli kreskantaj premoj; post senrezulta klopodo eviti sian elekton, en la malfrua mateno de la 4a de aŭgusto 1903 li estis elektita papo per 50 voĉoj el la 62 teorie eblaj (80,6%).

Li alprenis la papan nomon Pio, memore pri la Papoj kiuj portis ĉi tiun paŝtistan nomon kaj kiuj "en la pasinta jarcento kuraĝe bataladis kontraŭ la sektoj kaj la eraroj", t. e. Papoj Pio la 6a, Pio la 7a kaj Pio la 9a.

Li anoncis la programon de sia papado per la encikliko *E supremi*



*Desegno kiu bildigas la kronadon de Pio la 10a (9an de aŭgusto 1903)*

*apostolatus cathedra* (El la plejsupera apostola katedro) datita la 4an de oktobro 1903, en kiu enestas ankaŭ la papa devizo *Instaurare omnia in Christo* (laŭvorte: sumigi ĉion en Kristo)[29].

La realigoj de tia programo komenciĝis tuj urĝaritme: ekde la *motu proprio* (t. e. meminiciata decido) *Tra le sollecitudini* (Tra la zorgemoj de la paŝtista ŝarĝo, datita la 22an de novembro 1903) por la reformo de la eklezia muziko, ĝis la *motu proprio Fin dalla prima* (Ekde la unua, 18an de decembro 1903) por la reordigo de la Popola Kristana Agado, ĝis la deklaro *Commissum nobis* (Konfidita al ni, 20an de januaro 1904), en kiu li kondamnis la Vetoo-rajton en la konklavejo, t. e. tiun anakronisman rajton de la eŭropaj ŝtatestroj bloki la papan elekton de neŝatata kardinalo: uzis ĝin - kaj ne estis la unua fojo, sed ja la lasta - kardinalo Puzyna, episkopo de Krakovo, ĝuste dum la konklavo kiu rezultigis la elekton de Pio la 10a.

Sekvis poste la encikliko *Ad diem illum* (En tiu ĝojega tago, 2an de februaro 1904) okaze de la kvindeka datreveno de la difino de la dogmo pri la Senmakula Koncipiĝo de Maria, la letero *Quum arcano* (Kiam pro mistera plano, 11an de februaro 1904) per kiu li anoncis la apostolan viziton al urbo Romo[30], sekvata, post nelonge, de la dekreto *Constat apud omnes* (Rezultas ĉe ĉiuj, 7an de marto 1904), per kiu li prenis samspecan inicia-



*Pio la 10a en la vatikanaj ĝardenoj.*

ton por la apostola vizito al la italaj diocezoj.


*Pio la 10a kun kelkaj kurianoj.*

Kvin tagojn poste estis la vico de encikliko *Iucunda sane* (Certe ĝoja datreveno, 12an de marto 1904) okaze la 13a jarcento de Sankta Gregoro la granda kaj, post pliaj 12 tagoj, de *motu proprio Arduum sane munus* (Certe ege malfacila tasko, 19an de marto 1904) pri la kompilado de la nova kanonjura kodo: li ne vidos ĉi tiun kolosan entreprenon finita: ĝin promulgos lia posteulo, Benedikto la 15a, la 25an de majo 1917, tagon de Pentekosto.

Fronte al la itala politiko, la nova Papo komencis singarde mildigi la *Non expedit* kaj malfermiĝi al la politikaj moderaj fluoj por eviti la elektadon de radikalaj aŭ socialistaj elstaruloj.

Plie, fronte al la krizo de la Institucio de la Kongresoj, li alprenis decidon pri ĝia dissolvo, laŭ strategia plano, kiu celis kunordigi la agadon de la katolika laikaro sub firma eklezia regado: per la letero *La lettera circolare* (La cirkulero, unuan de marto 1905) li malaprobis la Kristanan Aŭtonoman Demokration, kaj per encikliko *Il fermo proposito* (La firma intenco, 11an de junio 1905) li favoris la reorganizadon de la Katolika Agado en Italio. Konscia pri la graveco de la katolika laikaro por la kristana rekonkero de la socio, li vidis en sia agado daŭrigon de la agado de la klerikaro, laŭ konfesia konceptado el kiu evidentiĝis paŝtista pragmatismo, rezulto de pli ol 40 jaroj da agado kiel iama parokestro de Salzano, kanceliero en Treviso, episkopo en Mantova kaj kardinalo patriarko en Venecio.

1905 estis ankaŭ la jaro de encikliko *Acerbo nimis* (Dum tro maldankemaj kaj malfacilaj tempoj, 15an de aprilo 1905) pri la instruado de la katekismo, unu el la unuaj intervenoj ĉi-sektore, pro kiu li estos nomita la "Papo de la katekismo". Sed, apud ĉi tiu titolo, oni trovas ankaŭ "Papo de la Eŭkaristio", ĉar la Eŭkaristio estis la fundamenta temo de la dekreto *Sacra Tridentina Synodus* (Sankta Koncilio de Trento, 20an de decembro 1905) pri la ofta kaj ĉiutaga komuniiĝo.

En la internacia politiko estis intertempe eksplodinta la franca problemo: post la eventoj kunligitaj kun la "maljustegaj leĝoj", aprobitaj en Francio kontraŭ la Eklezio inter 1880 kaj 1903, kaj post la diskutadoj kiujn estigis



*Émile-François Loubet, prezidanto de la franca respubliko de 1899 ĝis 1906.*

la vizito al la itala Reĝo fare de la franca prezidanto Émile-François Loubet (1838-1929), vizito okazinta en 1904, la 9an de decembro 1905 la franca parlamento aprobis la leĝon por la disiĝo inter Ŝtato kaj Eklezio. La respondo de Pio la 10a ne atendigis sin, kaj ĝi konkretiĝis per du enciklikoj kontraŭ la franca regantaro: en encikliko *Vehementer* (Impete, 11an de februaro 1906) li kondamnis la disiĝon de la Eklezio disde la Ŝtato en Francio, kaj en *Gravissimo officii munere* (Pro gravega ofica devo, 10an de aŭgusto 1906) li kondamnis la leĝojn pri kultado proponitajn de la franca regantaro.

Ili ne estis la ununuraj agoj kunligitaj kun la diskutadoj inter Eklezio kaj Ŝtato. En aliaj landoj, kiel Ekvadoro kaj, post kelkaj jaroj, Portugalio, la registaroj promulgis "persekutajn leĝojn" kontraŭ la Eklezio: Pio la 10a esprimis "sian doloron" per la letero *Acre nefariumque bellum* (Akra kaj krima milito, 14an de majo 1905) kontraŭ la leĝoj voĉdonitaj en Ekvadoro kaj, ses jarojn poste, per encikliko *Jamdudum in Lusitania* (Jam de longe en Luzitanio, 24 majo 1911), kontraŭ tiuj aprobitaj en Portugalio.

Kiel kronadon de efika kaj zorgema agado, daŭrinta almenaŭ 30 jarojn, li plenumis reformo-planon de la italaj seminarioj, realigitan per solena dispozicio de la 16a de januaro 1906.

En la sama jaro estis du papaj intervenoj, la unua pri la pastraro kaj la dua pri la sakramento de la Eŭkaristio: encikliko *Pieni l'animo* (Animoplenaj, 28an de julio 1906) pri la edukado de la juna klerikaro kaj dekreto *Post editum* (Post la manĝo, 7an de decembro 1906) pri la komunio al manĝintaj malsanuloj.

Post plia redeklaro, per encikliko *Une fois encore* (Ankoraŭfoje, 6an de januaro 1907), de la starpunkto de la Sankta Seĝo rilate al franca regantaro, Pio la 10a kondamnis 65 modernistajn propoziciojn per la dekreto *Lamentabili sane exitu* (Pro certe priplorinda rezulto, 3an de julio 1907) kaj la tutan modernistan movadon per la encikliko *Pascendi dominici gregis* (Ofico de paŝtenda dia ŝafaro, 8an de septembro 1907), difinante la Modernismon kiel la resumon de ĉiuj herezoj, kaj malferminte sezonon de la historio de la tiuepoka Eklezio, kiu ne estas ankoraŭ komprenata kaj profunde studata. Dum 1907 estis la kulmina punkto de ĉi tia lukto inter

Papo Pio la 10a kaj la Modernismo: la tiam okazintaj eventoj igis necesa aldonan esploron antaŭ la beatproklamo de Pio la 10a, por respondi al la serio da suspektoj kaj "venenoj" distrumpetitaj pri la agado kaj pri la efektivaj respondecoj de la Papo[31]: li intervenis energiege, ĉiam per "fera mano en velura ganto", pro la fakto ke lia nekompromisema formado ne permesis al li alian agadmanieron, kaj la epoko dum kiu li vivis ne permesis distingi inter "eraranto" kaj "eraro".

La atestantoj dum la kanonikaj procesoj samopiniis: kvankam li elmontris "neflekseblan energion, tute pravan pro la danĝero kiu ŝvebis sur la Eklezio, tamen kun la Modernistoj li havis ĉiam nesupereblan karitaton kaj senmezuran mizerikordon. [...] Li volis ke oni eluzu *ĉiujn rimedojn humane eblajn* por ilin admoni kaj persvadi pri iliaj religiaj eraroj, tre rekomendante, ke *oni ne difektu je karitato*. [...] Li ne forlasis ilin al ilia destino: li sekvis ilin per patra okulo, li klopodis ĉiun vojon por ilin revoki kaj, se ili havis ekonomiajn malfacilaĵojn, li prizorgis ankaŭ ilian vivtenadon"[32]. En la dispozicia parto de encikliko "Pascendi" la antaŭviditaj rimedoj estis alcelaj: kaj ili kulminis (unuan de septembro 1910) per la ordono de la kontraŭmodernista ĵuro, kiel pruvo pri la konstanta zorgemo de Pio la 10a por la integreco de la *Depositum Fidei* (elp. Depozitum Fidei, t. e. Kredtrezoro) [33].

El tia kontraŭstaranta sinteno fronte al la novaj ideoj kaj fermentoj en kaj ekster la Eklezio, naskiĝis la konvinko laŭ kiu Papo Sarto estas Papo "malprogresema" kaj "reakcia".

Ne mankis tamen liaj intervenoj el originala reforma graveco kaj el universala spiro: kiel la apostola deklaro *Sapienti consilio* (Pro sciplena konsilo, 29an de junio 1908) pri la reformo de la roma kurio, la letero *Quidquid consilii* (Io de la konsilo, 8an de julio 1908) pri la



*Papo Pio la 10a kun sia ŝtatsekretario, kardinalo Merry del Val.*

unuiĝo de la orientaj Eklezioj kaj laste, du jaroj post la antaŭa, la apostola letero *Ex quo nono* (Post la tagoj en kiuj, 26an de decembro 1910) al la episkopoj de oriento pri la unuiĝo de la Eklezioj, kiu substrekas unu el la plej interesaj ekumenaj aspektoj de la papado de Pio la 10a.



*Kun la roma Kurio*

Havis aparte efikan influon la alvoko al la pastraro *Haerent animo* (Enradikiĝas en la animo, 4an de aŭgusto 1908), kiun li verkis okaze de la solenado de sia pastra jubileo.

Per la apostola deklaro *Promulgandi pontificias* (Por promulgi papajn konstituciojn, 29an de septembro 1908), li fondis la periodaĵon *Acta Apostolicae Sedis* (Agoj de la Apostola Seĝo), tio estas la ununura oficiala organo de la Sankta Seĝo pri la doktrinaj kaj disciplinaj problemoj, kiu anstataŭigis la antaŭan *Acta Sanctae Sedis* (Agoj de la Sankta Seĝo), starigitan de Pio la 9a en 1865.

Sekvis poste la enciklikoj *Communium rerum* (En la nunaj sortoŝanĝoj, 21an de aprilo 1909), okaze de la 8a jarcento de Sankta Anselmo el Aosto, *Vinea electa* (Elektita vitejo, 7an de majo 1909), pri la fondo de la *Pontificio Istituto Biblico* (Papa Biblia Instituto), *Editae saepe* (La sentencoj, kiujn ofte la Dia parolo revokas, 26an de majo 1910), en la 3a jarcenta datreveno de Sankta Karlo Borromeo, kaj *Quam singulari Christus amore* (Per kiom speciala amo de Kristo, 8an de aŭgusto 1910) pri la komunio de la geknaboj: ĝi estas unu el liaj plej famaj enciklikoj dediĉitaj al la eŭkaristio, kaj pri ĝi li deklaris: "Dio mem inspiris al mi ĉi tiun dokumenton".

En la sociala sektoro la intervenoj de Papo Sarto estis certe ne sensaciaj kiel tiuj de lia antaŭulo Leo la 13a: menciindas la interveno okaze de la inaŭguro de la Socia Katolika Lernejo de Bergamo la 15an de aŭgusto 1910, kaj la letero *Notre charge apostolique* (Nia apostola ŝarĝo, 25an de aŭgusto 1910), per kiu li kondamnis la teoriojn disvastigitajn de la franca revuo *Sillon* ("la sulko") de Marc Sangnier (Parizo, 1873-1950), kiu tuj submetiĝis komplete kaj senkondiĉe al la volo de la Papo. Alia substrekenda evento estas la pli kaj pli granda sentiveco kaj organizado de iniciatoj de la Eklezio, dum la papado de Pio la 10a, favore al solvo de la problemoj de elmigrado.



Sur la mortolito

Aliaj papaj agoj de Pio la 10a estis la apostola deklaro *Divino afflatu* (Pro Dia inspiro, unuan de novembro 1911), kiu reformis la roman brevieron; la apostola deklaro *Etsi nos* (Kvankam Ni, unuan de januaro 1912), kiu antaŭvidis la reformon de la vikariejo de Romo; la encikliko *Lacrimabili statu* (Pro priplorinda stato, 7an de junio 1912) pri la malhumanaj kondiĉoj en kiuj devis vivi la indiĝenoj de Latinameriko; la encikliko *Singulari quadam* (Pro escepta karitato, 24an de septembro 1912) pri la laborsindikatoj en Germanio kaj la apostola letero *Universis Christifidelibus* (Al ĉiuj fideluloj de Kristo, 8an de marto 1913), okaze de la 16a jarcenta datreveno ekde la Koncilio de Konstantinopolo.

Studante la elpaŝojn de Pio la 10a eble estiĝas miro, ĉar Papo Sarto neniam intervenis rilate al la sciencaj temaroj, eĉ se la jaroj dum kiuj li vivis estis tiuj kiuj registris la renverson de plurjarcentaj fundamentoj de la fiziko, pere de la formulado de la kvantoteorio (1900) de Max Planck (1858-1947), de la teorio pri la strikta relativeco (1905) de Albert Einstein (1879-1955), kaj de la atoma interpretado de la fizika realo (1903-1913) fare de fizikistoj Joseph John Thomson (1856-1940), Ernest Rutherford (1871-1937) kaj Niels Bohr (1885-1962).

Tio ĉi estas stranga fakto, ĉar Giuseppe Sarto ĉiam kulturis sciencajn studojn, precipe koncerne matematikon kaj astronomion: li ĉiam sukcesis bonege en ĉi tiu studofako, esprimante sian sciencan diverstalenton en la konstruado de sunhorloĝoj kaj, kiel Papo, li sekvis diligente la agadon de la vatikana *Specola* (elp. spekola, t. e. astronomia observatorio), fondita de lia antaŭulo[34].

La laŭgrada aĉiĝo de lia sano kaj la politika situacio kiu pli kaj pli malboniĝis en Eŭropo, kondukis lin al la tombo. Angoroplena li adresis, la 2an de aŭgusto 1914, la alvokon *Dum Europa* (Dum Eŭropo) al ĉiuj katolikoj de la mondo por petegi la tujan ĉesigon de la eŭropa milito ĵus eksplodinta, kaj kiu poste kulminos en la unua mondmilito: ĝi estis kordolora alvoko ĉesigi la kontraŭecon kaj provi ĉiun vojon por la ĉesigo de la milito, por la supera bono de la homaro kaj de la paco. Ĝi estas unu el la testamentoj pri paco, el tiuj plej eminentaj, kiuj estas transdonitaj al la estontaj generacioj.

Li mortis je la horo 1.16 de la 20a de aŭgusto 1914, ĵaudon. Li estis entombigita en la vatikanaj grotoj kaj sur lia tombo estis gravuritaj la vortoj: PIUS P.P. X - DIVES ET PAUPER - MITIS ET HUMILIS CORDE - REIQUE CATHOLICAE VINDEX FORTIS - INSTAURARE OMNIA IN CHRISTO - SATAGENS - PIE OBIIT DIE XX AUG. A. D. MCMXIV (Pio la deka - riĉa kaj malriĉa - milda kaj elkore humila - kaj nevenkita defendinto de la katolika religio - ema renovigi ĉion en Kristo - pie mortis la 20an de aŭgusto en la jaro de la Sinjoro 1914).

Ĉi tiuj vortoj resumas vivon kaj papadon tute en la ombro de la kruco kaj sub la signo de malriĉeco plej rigore travivita [35].

## NOTOJ POR LA NAŬA ĈAPITRO

[28] VERCESI E., *Tre Papi [Tri Papoj]*, Edizioni Athena, Milano, 1929, p. 175.

[29] Oni trovas la devizon en *Efesanoj 1, 10*, sed multaj estas la tradukoj kaj la atribuitaj signifoj. Ekzemple, unu el ili estas: *la plano resumi en Kristo ĉiujn aferojn, de la ĉielo kiel de la tero. Per sia bonvolemo [Dio] antaŭfiksis tion en li, por realigi ĝin en la pleneco de la tempoj* (BELTRAME QUATTROCCHI P., *I salmi preghiera cristiana Salterio corale [La Psalmoj kristana preĝo korusa psalmaro]*, 9a eldono, Benedettine, Sant'Agata sui due Golfi (Napoli), 1986, p. 409). Ĉi tiujn vortojn reeĥas, en *Koloseanoj 3, 11*, sama paŭla koncepto. Oni tie legas: *Tie ĉi ne povas esti Greko kaj Judo, cirkumcido kaj necirkumcido, barbaro, Skito, sklavo, liberulo, sed Kristo estas ĉio kaj en ĉio* (*La Sankta Biblio*, oficiala Eldono de la Itala Episkopa Societo, Ed. Conferenza Episcopale Italiana, UECI, 1974, pp. 1175). La devizo de Pio la 10a *Instaurare omnia in Christo* estas ĉiam tradukita, per ne malkaŝita speco de memplaĉo kaj de staro kontraŭ la monda kulturo, laŭ la signifo *Restaŭri en Kristo ĉion*, kaj estis ĉiam komprenita ekskluzive laŭ integrisma kaj reakcia senco, de restaŭrado precize. Se oni rilatigas al la epoko en kiu ĝi estis eldirita, male oni devas kompreni ĝin laŭ multe pli moderna signifo, laŭ logiko kiu, pro multaj vidpunktoj, estas antaŭbildigo de la dua Vatikana Koncilio: *Refondado de ĉio en Kristo*, kaj, laŭ pli profunda kaj vasta signifo, kiu estis kaptita per la spirito de la "maturaj tempoj" nur de tiu Koncilio, inviti la kristanojn esti vere tiaj nur bazante, ĉiutage kaj ĉiuokaze, la vivon sur la parolo de Kristo. Nun oni tradukas ankaŭ "resumi, sumigi, unuigi, kunigi, rekunigi, fondi, refondi en Kristo ĉion, kio estas en la ĉieloj kaj sur la tero". En Germanio oni tradukas *Alles in Christo erneuern*, t. e. *Renovigi ĉion en Kristo*.

[30] Neniu Papo antaŭ Pio la 10a "aplikis la preskribojn de la Koncilio de Trento, plenumi paŝtistan Viziton al urbo Romo" kiel episkopo de tiu urbo. Oni konsultu vastan intervenon de Gianpaolo Romanato kaj de Silvio Tramontin in AA. VV., *Quaderni della Fondazione Giuseppe Sarto [Kajeroj de Fondaĵo Giuseppe Sarto]*, 1, januaro 1990, pp. 19-45, ĉefe je p. 32.

[31] [ANTONELLI F.], *Sacra Rituum Congregatio Sectio Historica n. 77 Romana Beatificationis et Canonizationis Servi Dei Pii Papae X Disquisitio circa quasdam obiectiones modum agendi Servi Dei respicientes in Modernismi debellatione una cum Summario Additionali ex Officio compilato [Historia Sekcio de la Sankta Kongregacio de la Ritoj n. 77 Roma proceso por la Beat- kaj Sankt- proklamo de la Diservanto Papo Pio la 10a Disertacio pri kelkaj obĵetoj kontraŭ la agadmanieroj*

*de la Diservanto koncerne la neniigon de la Modernismo kune kun aldona kompendio pro la ofico redaktita]*, Typis Polyglottis Vaticanis, 1950, p. 303.


32 DAL-GAL G., *Il papa santo Pio X Vita ufficiale della Postulazione per la Causa di Canonizzazione [La Papo sankta Pio la 10a Oficiala biografio de la Postulatorejo por la Proceso de Kanonizado]*, Il Messaggero di Sant'Antonio, Padova, 1954, pp. 185-186.

33 ZAMBARBIERI A., Voce *Pio X* [Gloso *Pio la 10a*], en *Dizionario storico del movimento cattolico in Italia [Historia terminaro de la katolika movado en Italio]*, Vol. II: *I protagonisti [La ĉefroluloj]*, Marietti, Torino, 1982, pp. 486-95.

34 DANIELE I., DANIELE I., *San Pio X alunno del seminario vescovile di Padova (13 novembre 1850-14 agosto 1858) [Sankta Pio la 10a lernanto de la Padova episkopa seminario (13an de novembro 1850-14an de aŭgusto 1858)]*, Istituto per la Storia Ecclesiastica Padovana, Padova, 1987, p. 17-41; MAFFEO S., *Nove papi una missione Cento anni della Specola Vaticana [Naŭ Papoj unu misio Cent jaroj de la Vatikana observatorio]*, Pontificia Academia Scientiarum, Città del Vaticano, 1991, pp. 52-56.

35 Ĉi tiuj vortoj bone kongruas kun tiuj de lia manskribita testamento: "Naskita malriĉa, vivinta malriĉa kaj certa morti malriĉega" (ROMANATO G., *Pio X La vita di papa Sarto*, Rusconi, Milano, 1992, pp. 289-90) kaj, kvankam li tute ne emis ricevi surterajn honorojn, li devis akcepti, ke la familio fariĝu nobela: "La familio, laŭ la papa Buleo de Benedikto la 14a *Urbem Romam* [La urbo Romo] de 1746, estis aligita al la roma nobelularo, kaj konsekvence ĝi estas enskribita en la Italan Nobelan Liston kun la titolo "roma nobelulo" aŭ "roma nobelulino", en la persono de la posteuloj de la gefratoj de Pio la 10a". Oni konsultu SPRETI V., *Enciclopedia storico-nobiliare italiana [Itala historia nobela Enciklopedio]*, vol. II, Forni Editore, Bologna, 1969 (Rist. anastastica dell'ed. di Milano, [fotorepreso de la eldono de Milano], 1928-35, p. 447).

*La unua tombo de Pio la 10a en la vatikanaj Grotoj, ĝis la 17a de februaro 1952 kiam lia korpo estis metita ene de la Baziliko de Sankta Petro.*



## La kanonikaj procesoj (1923-1946)



La famo de Papo Pio la 10a kiel sanktulo estis ĉiam sur ĉies buŝoj. La hagiografoj pri Pio la 10a certigas la famon de lia sankteco dum li vivis, ĉe lia morto kaj post lia forpaso.

Preskaŭ naŭ jarojn post lia morto, la 14an de februaro 1923, 28 kardinaloj petis al Papo Pio la 11a la gloradon de Pio la 10a, kaj indikis pastron Benedikto Pierami de la Benediktanoj *Vallombrosani,* abato de la preĝejo de Sankta Prassede en Romo, kiel postulatoron de la proceso por sanktproklamo.

Tiu pastro aranĝis la ordinarajn informajn procesojn dioceznivele, kiuj okazis inter 1923 kaj 1931, en la diocezoj de Treviso (1923-26), Mantova (1924-27), Venecio (1924-30) kaj Romo (1923-1931), kolektante la skribajn atestojn de 205 atestantoj. Ĉi tiu kolosa tasko finiĝis la 8an de julio 1931.

Neatendite pastro Benedikto Pierami mortis la 12an de aŭgusto 1934: la sekvan 18an de oktobro transricevis la taskon pastro Alberto Parenti de la sama religia ordeno; li, la 12an de februaro 1943, je la fino de la pristudo de la ordinaraj diocezaj informaj procesoj, povis eldoni la *Positio super causae introductione* (Starpunkto pri la enkonduko de la proceso).

Dum la kanonjura konstato, okazinta la 19an de majo 1944, la korpon oni trovis nedifektita, volvita en la mirindaj papaj vestaĵoj. Fakte, la korpo, kiun Pio la 10a, per sia testamentaĵo, volis ne tuŝita de profanaj manoj, eĉ ne por la tradicia enbalzamigo, je kiu estas submetataj la kadavroj de la Papoj, estis en bonega konservostato, samkiel jarojn poste okazos kun la korpo de beata Johano la 23a, lia posteulo kiel kardinalo patriarko de Venecio (1953-58) kaj Papo de la universala Eklezio (1958-63) .

De 1943 ĝis 1946 estis celebrataj en la kvar supremenciitaj diocezoj la apostolaj procesoj kaj estis pridemanditaj 89 atestantoj.

Tri jarojn pli poste, en 1949, estis eldonita la *Positio super virtutibus* (Starpunkto pri la virtoj).

En 1950 Pio la 12a havis la intencon celebri tri grandajn eventojn: la proklamo de la dogmo pri la Ĉielenpreno de la Virgulino, la Sankta Jaro kaj la beatproklamo de Giuseppe Sarto, sed je la lasta momento aperis seriozaj rimarkoj pri la kon-duto de Papo Pio la 10a dum la periodo de la batalo kontraŭ Modernismo, kaj estis sekve starigita plia ekstervica pro-ceso ekde la 15a de decembro 1949, iĝinta necesa post la *Animadversiones* (kritikaj ri-markoj) de la Kredogardisto Salvatore Natucci (elp. Salva-tore Natuĉi). Ĉe la fino estis presita la *Nova positio super virtutibus* (1950) kune kun aldona *Summarium* (Indekso) de dokumentoj.

Post la supero de ĉiuj ĉi malfacilaĵoj, la proceso konis rimarkindan plirapidiĝon: la 11an de februaro 1951 estis agnoskitaj la du mirakloj postulataj por la beatproklamo, kaj la postan 4an de marto estis publikigita la dekreto *Tuto* (sendubeco por la beatigo), kiu sankciis jure la eblecon povi daŭrigi.

La 3an de junio 1951 okazis la solena ceremonio de la beatproklamo. Papo Pio la 12a eldiris vortojn el speciala efiko kaj li perfekte konsciis pri la historia kompliko de la agado de la Papo el Riese, lia antaŭulo, cetere de li bone konata, ekde la epoko kiam li komencis sian diplomatan karieron ĉe la Ŝtata Sekretariejo: Pio la 10a, "per sia agle-akra rigardo pli klarvida kaj pli sekura ol la mallongvido de miopaj rezonantoj" [...], "lumigata de la klareco de la senfina vero, gvidata de delikata kaj klara konscienco, de rigida honesteco" estas "homo, papo, sanktulo el tiom rimarkinda granda elstareco" ke "malfacile oni trovos la historiiston, kiu kapablas ampleksi globale lian personecon kaj, samtempe, liajn multoblajn aspektojn"[36].

Ok monatojn poste, la 17an de februaro 1952, la honorata korpa restaĵo de Pio la 10a estis metita sub la altaro de la Prezentado en la baziliko de Sankta Petro.

## NOTO POR LA DEKA ĈAPITRO

**36** OCCELLI P. L., *Il Beato Pio X Il papa che morì povero [Beata Pio la 10a La Papo kiu mortis malriĉa]*, Ed. Paoline, 2ª Ed., Bari, 1951, p. 285; V Ed., pp. 347-48.

## La glorado kaj la famo de Sankta Pio la 10a en la nuntempa mondo



Post la beatigo, la proceso por la sanktproklamo progresis rapide: la 17an de januaro 1954 estis agnoskitaj la du mirakloj, necesaj por la proklamo.

La 29an de majo 1954, antaŭ 800.000 personoj, Pio la 12a celebris la cerimonion de la kanonizado.

Pio la 10a estas la ununura Papo sanktprokla-mita ekde la 17a jarcento: ŝajnis al ĉiuj ke plenumiĝis la profetaĵo de *Il Giornale d'Italia* (elp. *Ĝornale d'Italja*, t. e. *Itala Gazeto*), kiu skribis: "La Historio igos lin granda Papo: la Eklezio igos lin granda Sanktulo"[37].

Komenciĝis la jardeko de la famo de Sankta Pio la 10a: la kulto al Sankta Pio la 10a atingis tuj la pinton kaj multaj preĝejoj en Italio kaj en la tuta mondo estis starigitaj honore al la nova sanktulo, kun pozitiva influo rilate al la liturgio kaj al la samepoka eklezia arto.

Nur dek jarojn poste tiu famo ekmalfortiĝis, ĉar dum la celebrado de la 2a Vatikana Koncilio aperis disputoj rilate al Pio la 10a, esence iom negativaj, precipe koncerne la rilatojn kun la moderna mondo.

Dum la postkoncilia periodo li estis laŭdegata de la tradiciistaj katolikoj, kiuj kaptis tre parte lian pian mesaĝon, rekomencante, preskaŭ tute, de la kontraŭmodernisma momento kaj de lia fermiteco fronte al la petoj de la moderna mondo: multaj el tiuj tradiciistaj katolikoj realigis skismon laŭ la spuroj de mons-ro Marcel Lefebvre (1905-1991) kaj de lia *Fraternité Saint Pie X* (Frataro Sankta Pio la 10a) de Econe.

Kontraŭe Pio la 10a estis misfamigita de la progresemaj aŭ *konciliaj* katolikoj, kiuj difinis lin kiel malcedema, integristo, tradiciisto, reakciema kaj alcentrigema.

En la tuta niatempa kristanaro la fideluloj estas animataj de suspekto, apatio kaj/aŭ indiferenteco rilate al Pio la 10a, kvankam ne mankas elstaraj rekonoj de liaj meritoj, jam prezentitaj de filozofo Benedetto Croce (elp. Benedeto Kroĉe), kaj la kultado al li estas nuntempe ankoraŭ vasta: li estas honorata kiel Papo de la Eŭkaristio kaj de la katekismo; la misiistoj estas al li dankemaj pro la impulso de li donita favore al la Misioj, al li estas titolitaj seminarioj, li estas kunpatrono de diocezoj, patrono de la trevisaj elmigrantoj en la mondo kaj de la katolikaj esperantistoj [38], kaj fine li estas honorata en 85 italaj, en 65 germanaj, en 15 belgaj, en 18 kanadaj, en 2 aŭstriaj kaj en 11 argentinaj parokoj.

Ĉe la historiistoj la juĝo estas ankoraŭ tre malproksime de la definitiva redakto: kaj ne povas esti alimaniere, konsiderante, ke li mortis nur antaŭ 100 jaroj kaj ke li estas, vole aŭ nevole, ankoraŭ ĉefrolulo.

Kelkaj historiistoj taksas lin malpozitive: inter la kritikantoj, en 1934 - t. e. en nesuspektinda epoko, ĉar fakte jam de 9 jaroj estis startigita la proceso por sanktproklamo - prof-ro Joseph Schmidlin dediĉis tutan malpozitivan ĉapitron al la kontraŭmodernisma agado de la *Sodalitium Pianum* (elp. Sodaliĉium Pianum, t. e. Pia Societo) de mons-ro Umberto Benigni (elp. Umberto Beninji, 1862-1934), formulante tre malfavorajn kaj pezajn juĝojn eĉ kontraŭ Pio la 10a, kiu estus favorinta tiun agadon[39]. Negativa, eĉ se limigita al la politika penso de la venetia Papo, estas ankaŭ la juĝo kiun pastro Luigi Sturzo (elp. Luiĝi Sturco) faris en 1937, laŭ kiu Pio la 10a "havis preskaŭ parokan ideon pri la politika vivo"[40]. En epoko pli proksima al la nia, Rudolf Lill donis plejofte negativan juĝadon: li evidentigas la reakcian kontraŭmodernismon kaj la ekscesan interpreton de la papa aŭtoritato [41].

Aliaj historiistoj donas parte pozitivan juĝon: Roger



*Printempo 1959: la urno kun la korpo de Pio la 10a estas en Venecio. Tiel realiĝis la promeso, kiun li faris al venecianoj, sojle de la papa elekto: "Aŭ vivanta, aŭ mortinta, mi revenos".*

Aubert (elp. Roĵè Obèr) difinas lin “reformisto kaj konservativulo samtempe”, sed li asertas krome, ke “Pio la 10a, kiu aperis al siaj samtempuloj tiom malmulte moderna kaj sekve konservativulo, estis efektive unu el la plej grandaj Papoj reformemaj en la historio, la plej granda reformanto de la interna vivo de la Eklezio post la Koncilio de Trento”[42]. Giacomo Martina (elp. Ĝàkomo Martina) donas globalan juĝon, speciale pro la fakto ke “la enketadoj plenumitaj okaze de la proceso por beatproklamo [...] kvankam ili metis en favoran lumon la profundan senton de respondeco de la Papo kaj lia ardon por la defendo de la kredo, [...] tamen ne eliminis ĉiujn dubojn pri la oportuno de la linio sekvata kaj ne konvinkis egale ĉiujn fakulojn”[43]. Pozitiva sed kun rezervoj estas la starpunkto de Silvio Tramontin (1919-1997) kiu, unuflanke reliefigas la religian dimension de la papado kaj la defendon de la kultura kristana riĉaĵo, kaj aliflanke li asertas ke tia persista defendo instigis la Papon “prefere malakceli kaj limigi, pli ol antaŭenpuŝi kaj favori en pluraj sektoroj, la agadon de la homoj de la Eklezio”[44].

Carlo Snider (elp. Karlo Snider), advokato de la Sankta Kongregacio por la Procesoj de la Sanktuloj, levas male la fingron kontraŭ la limoj de la

*23a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, Munkeno 1951: dum ĝi oni definitive sankciis la elekton de sankta Pio la 10a kiel patrono de la Unuiĝo.*



proceso kiu kondukis al la sanktproklamo de Pio la 10a: li evidentigas liajn limojn el historia kaj metodologia vidpunkto, sed li praktike starigas la personon en lia tempo kaj relokas lin en la jaroj dum kiuj li agadis, male ol tio, kion faris sufiĉe da sukereca hagiografio kiu, por edifi la legantojn, igis la sanktulon eltirita de lia epoko[45].



*Unu el la religiaj bildetoj eldonitaj en Esperanto honore al Pio la 10a*

Esence pozitiva kaj tre ekvilibra estas la juĝado de Joseph Lortz kaj de Gianpaolo Romanato (elp. Ĝanpaolo Romanato). La unua konsideras la agadon de Papo Pio la 10a kiel tiun de “Papo paŝtisto de animoj”, kiel la konsekvencan kaj neeviteblan konkludon kaj kronadon de pli ol kvindek jaroj de pastra ofico kiel “fervora paŝtisto de l’ animoj”, kiu havis la “tujan percepton pri ĉio, kio ne estis katolika”, kiu kapablis kunordigi puŝojn kontraŭstarantajn inter si, kiuj fontis el la “streĉiteco objektive ekzistanta inter kompato kaj juro”[46]. La dua aŭtoro estas konvinkita ke “necesas suprenlevi multajn vualojn por alveni al la aŭtentika Pio la 10a” kaj li rekonas la fruktodonan gravecon de paŝtista agado, kiu ankoraŭ influas sur la Eklezion: lia paŝtista linio “transvivas eĉ trans la paroĥa horizonto, kaj ĝi montris fekundecon de aplikadoj kiu eble ankoraŭ ne elĉerpiĝis” kaj “lia papregado [...] lokiĝas, kaj ne nur kronologie, ĉe la origino de la nuntempa Eklezio. Multaj karakterizoj de la katolikismo de la dudeka jarcento - la vertismo, la fortika jura organizado, la firmega intelekta strukturo, la valorigo de la laikaro - devenas de la reformoj de Pio la 10a, de liaj iniciatoj, de liaj intuicioj, de lia ekleziologia vido”[47].

Ne mankas zonoj de ombro sur kiujn estas necese ĵeti novan lumon, interpretante novajn dokumentojn de la Vatikana Arkivo, sed oni ne povas ne evidentigi la fakton ke, kvankam li estas akvodislima Papo inter du manieroj pri la kompreno de la Eklezia vivo, li elmontris sian specifan eklezian sentemon per granda kohereco de penso kaj de ago, efektivigante grandan kaj valoran penadon dum sia tuta eklezia vivo por esti kongrua kun la realaĵo de sia propra tempo, intervenante laŭcele per la reforma ĝustatempeco, kiun lia epoko postulis kaj per pragmata paŝtisteco, inspirita de kriterioj de atenta kaj zorgema defendo de la *Depositum Fidei* (elp. Depozitum Fidei, t. e. Kredtrezoro).

Ne mankis eĉ penigaj verdiktoj, satiraj mokadoj, profanantaj kliŝoj. El ili mi citas du juĝojn. La unua estas anonima, sed estas unu el multaj, oftaj sentencoj kiuj estas sur la buŝo de multaj uloj: “Naskita en la habsburga Venetio, li povis agi nur por “igi lombardia-venetia” la Eklezion, per ĉiuj subpremaj kaj alcentremaj sintenoj, implicitaj en tio”. Pli ironia kaj *softa*, sed ne malpli negativa, estas la akuzo de la kaŭstika mons-ro Louis Marie Olivier Duchesne (1843-1922), kiu atribuis al Pio la 10a, pro lia provinca vido de la Eklezio kaj pro lia limigita kultura horizonto - de pastro kun originoj en provinca Venetio - la transformon de la fragila boato de Sankta Petro en... gondolon de Sankta Petro.

Entute, oni povas respondi ke, se li estus la nura patriarko de Venecio elektita Papo en la 20a jarcento, oni povus supozi ŝercon de la Providenco: inter multaj Papoj altnivelaj, eminentaj kaj “per profeteca spirito dotitaj”, ĝi povus esti doninta al si paŭzon dum la irado direkte al la plena savo de la homaro.

Sed ĉi tiu subtila cerbumado falas se oni atentas aliajn samspecajn situaciojn: “bedaŭrinde por la kritikantoj”, tiuj kiuj en la 20a jarcento “transformis” la boaton de Sankta Petro en gondolon de Sankta Petro estis eĉ tri, kaj kun la rezultoj kiuj estas al ĉiuj tre famkonataj: aldone al Sarto, la historio registras ankaŭ kardinalon Angelo Giuseppe Roncalli (1881-1963), kiu iĝis Papo Johano la 23a, kaj Albino Luciani (1912-1978), Papo Johano Paŭlo la 1a.

Kaj, kia hazardo!, ĉiuj tri estis patriarkoj de Venecio.

Rilate al Sarto, se vere ni volas esti je la malalta nivelo de la kritikoj kaj de la mallaŭdantoj (kiuj scias pli ol la Sankta Spirito...), prefere ol surpriziĝi pri la elekto al papado de pastro kun sperto tiom limigita kaj el regiona nivelo, oni devus kontraŭe miri pri la malo, aŭ prefere pri la fakto, ke pastro taksata el tiom malalta valoro kaj kun tiel provinca mensa horizonto, kapablis agadi kiel paŝtisto de la Katolika Eklezio per tioma (eble ekscesa) energio, vigleco, forto, sekureco kaj reforma emo.

Oni komprenus, ke la Dia Providenco, por atingi la celon pretigi en la dudeka jarcento la kristanan mesaĝon por la tria Jarmilo trans la jaro 2000, t. e. por transpaŝi la sojlon de la espero, antaŭ ol plenumi la grandan paŝon, preferis, kaj eĉ trifoje, anstataŭ la ŝtorman maron de Tiberiado, navigadi en riskantaj ekosistemoj.

Kiel la laguno de Venecio dum la epokoj de Sarto, Roncalli kaj Luciani.

Kaj kiel la laguno de la hodiaŭa epoko.

# NOTOJ POR LA DEKUNUA ĈAPITRO

37 La lasta Papo sankt-proklamita antaŭ Pio la 10a estis Pio la 5a (Paolo Ghislieri, Bosco (Alessandria), 17an de januaro 1504 - Romo, 1an de majo 1572). Konata kiel la Papo de la venko en Lepanto, travivita dum la periodo de la Kontraŭreformacio, li estis beatproklamita la 1an de majo 1672, 100 jarojn post la morto, kaj sanktproklamita la 22an de majo 1712; li estis deklarita patrono de la Kongregacio de la Sankta Ofico, la hodiaŭa Kongregacio por la instruo de la Kredo. La cititaj vortoj aperis en *Il Giornale d'Italia* de la 22a de aŭgusto 1914. Il *Giornale* estis fondita en Romo la 15an de novembro 1901 fare de Sidney Sonnino kaj de aliaj elstaruloj de la liberala kaj kontraŭklerikala dekstro; ĝi estas fama pro lo spaco donita al kulturaj temoj en la "tria paĝo", (publikigita unuafoje la 9an de decembro 1901), aranĝo elpensita de Alberto Bergamini (1871-1962), kiu estis direktoro de la ĵurnalo ekde 1901 ĝis 1923.

38 "Lia beatproklamo (3an de junio 1951) estis salutita ĝojplene de la partoprenantoj en la 23a Kongreso de IKUE en Munkeno en Bavarujo, kaj Pio la 10a estis proklamita ĉiela patrono de la katolikaj Esperantistoj". IKUE, t. e. Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, estas la monda organizado de la katolikaj Esperantistoj: fondita en 1910, kunlaboras ekde 1951 kun UEA, Universala Esperanto-Asocio; ĝi estis rekonita oficiale de Sankta Seĝo, kaj havas evangelizadon, unuecon de la Eklezio, la homan interkomprenon, la ekumenismon, la fratecon kaj la pacon kiel celojn; ĝia oficiala organo, "Espero Katolika", estis fondita en 1903 kaj enhavis en la unua paĝo de la unua numero (oktobro 1903) poezion dediĉitan al Papo Pio la 10a fare de la aŭtoro, la litova pastro Aleksandro Dambrauskas (1860-1938). Oni konsultu SARANDREA C., *Discernimento dei papi da San Pio X a oggi sul carisma dei cattolici esperantisti [Komprenkapablo de la Papoj ekde Sankta Pio la deka ĝis hodiaŭ pri la karismo de la esperantistaj katolikoj]*, skriba raporto legita dum la 10a Kongreso de UECI (Unione Esperantisti Cattolici Italiani [Itala Katolika Unuiĝo Esperantista]), kiu okazis en Paderno del Grappa (Treviso) de la 6a ĝis la 10a de septembro 1996. En la sama raporto oni povas legi pri tre interesaj eventoj. La 2an de junio 1906, "dum la aŭdienco la Papo esprimis simpation por la nova idiomo" (p. 2). "Papo Pio la 10a restis proksima kiel patro al la esperantista movado: de 1906 ĝis 1914 li sendis ĉiujare Sian benon al Espero Katolika, al la esperantistaj katolikoj" (p. 3). "La 4an de aprilo 1909, Frato Isidoro Clé estis akceptita aŭdience de Papo Pio la 10a: dum ĉi tiu aŭdienco Sankta Pio la 10a eldiris la profetecan frazon: "Esperanto havas antaŭ si grandan estontecon" (pp. 3-4). Dum aliaj okazoj li donis la apostolan benon kaj indulgencon. Aliajn sciigojn oni trovas en la artikolo SARANDREA C., *Kvazaŭ historio*, en "Espero Katolika", 12 (1983), pp. 192-203 kaj KORYTKOWSKI J., *Internacia lingvo en Eklezio kaj mondo*, IKUE-Centro, Roma, 1976, pp. 131-32 kaj, en itala versio, KORYTKOWSKI J., *La Chiesa e il problema della lingua ausiliare internazionale [La Eklezio kaj la problemo de la internacia helplingvo]*, Pontificio Ateneo Antoniano, Roma, 1976, p. 116.

39 SCHMIDLIN J., *Papstgeschichte der neuesten Zeit Pius X und Benedikt XV [La historio de la Papoj de la dudeka Jarcento Pio la 10a kaj Benedikto la 15a]*, vol. III, Kosel und Pustet, München, 1934, pp. 1-170, kun specifaj tektoj je paĝoj 162-169. La franciskana Ĝenerala Raportanto F. Antonelli raportas ke J. Schmidlin estis "historiisto iom partianeca": [ANTONELLI F.], *Sacra Rituum Congregatio Sectio Historica n. 77 Romana Beatificationis et Canonizationis Servi Dei Pii Papae X Disquisitio circa quasdam obiectiones modum agendi Servi Dei respicientes in Modernismi debellatione una cum Summario Additionali ex Officio compilato*, Typis Polyglottis Vaticanis, 1950, p. XXIII (vidu noton 31).

[40] STURZO L., *Chiesa e Stato Studio sociologico-storico [Eklezio kaj Ŝtato Socia-historia pristudo]*, vol. II, Bologna, 1978, p.153.

[41] LILL R., *Storia ecumenica della Chiesa [Ekumena historio de la Eklezio]*, Queriniana, Brescia, 1981, vol. II, p. 221.

[42] AUBERT R., en AA. VV., *Storia della Chiesa*, diretta da H. JEDIN, vol. IX, Jaca Book, Milano, 1979, pp. 457-630; in *Nuova Storia della Chiesa [Nova historio de la Eklezio]*, vol. V/1, Marietti, Torino, 1977, pp. 21-265.

[43] MARTINA G., *La Chiesa nell'età del totalitarismo [La Eklezio dum la epoko de la totalismo]*, Morcelliana, Brescia, 1984[5], p. 78-79.

[44] TRAMONTIN Sankta, *Un secolo di Storia della Chiesa Da Leone XIII al Concilio Vaticano II [Unu jarcento da Historio de la Eklezio Ekde Leono la 13a ĝis la dua Vatikana Koncilio]*, Studium, Roma, 1980, vol. I, pp. 51-104.

[45] SNIDER C., *L'episcopato del cardinale Andrea C. Ferrari I tempi di Pio X [Episkopa agado de kardinalo Andrea C. Ferrari La epoko de Pio la 10a]*, vol. II, Neri Pozza, 1982, pp. 131-208.

[46] LORTZ J., *Storia della Chiesa considerata in prospettiva di storia delle idee [Historio de la Eklezio konsiderita laŭ la perspektivo de historio de la ideoj]*, vol. II, Ed. Paoline, Alba (Cuneo), 1973, pp. 490-91.

[47] ROMANATO G., *Giuseppe Sarto e il Movimento cattolico [Giuseppe Sarto kaj la katolika movado]*, en: AA. VV., *Le radici venete di San Pio X Saggi kaj ricerche [La venetiaj radikoj de Sankta Pio la 10a Eseoj kaj esploroj]*, zorge de Silvio Tramontin, Morcelliana, Brescia, 1987, p. 142-44. ROMANATO G., *Pio X La vita di papa Sarto [Pio la 10a La vivo de Papo Sarto]*, Rusconi, Milano, 1992, pp. 6-8. De Romanato estas plie memorigenda la grandvalora kunordigo de la eseoj de 40 aŭtoroj, kio kondukis al la eldono de la libro AA. VV., *Pio X Un papa e il suo tempo [Pio la 10a Unu Papo kaj lia epoko]*, Ed. Paoline, Cinisello Balsamo, 1987, p. 326.

# KRONOLOGIO

| | | |
|---|---|---|
| 1835 | 2an de junio | Naskiĝo de Giuseppe Melchiore Sarto en Riese (Treviso). |
| 1846-1850 | | Gimnaziaj studoj en Castelfranco Veneto. |
| 1850 | 19an de septembro | Klerika vestado en Riese fare de la paroĥestro pastro T. Fusarini. |
| | 13an de novembro | Eniro en la seminarion de Padovo. |
| 1858 | 18an de septembro | Pastra ordino en Castelfranco Veneto fare de episkopo G. Antonio Farina. |
| | 13an de novembro | Kapelano en Tombolo. |
| 1867 | 14an de julio | Paroĥestro en Salzano. |
| 1875 | 28an de novembro | Kanoniko de la katedralo de Treviso, spirita direktoro de la seminario, kanceliero de la episkopa kurio. |
| 1884 | 16an de septembro | Elektita episkopo de Mantovo. |
| | 16an de novembro | Konsekrita episkopo en la baziliko de Sankta Apollinare en Romo. |
| 1885 | 19an de aprilo | Eniro en Mantovon kiel episkopo. |
| 1888 | 10an de septembro | Li anoncas la diocezan Sinodon. |
| 1893 | 12an de junio | Kreita kardinalo kun la titolo de Sankta Bernardo *alle Terme*. |
| | 15an de junio | Elektita patriarko di Venecio. |
| 1894 | 2an defebruaro | Morto de lia patrino Margherita Sanson. |
| | 24an de novembro | Eniro kaj triumfa akcepto en Venecio. |
| 1901 | 4an de aŭgusto | Supreniro al Monto Grappa por beni la sanktejon kaj la statuon de la Madono. |
| 1903 | 4an de aŭgusto | Elektita Papo, li prenas la nomon Pion la 10an. |
| | 9an de aŭgusto | Kronado en la Baziliko de Sankta Petro. |
| | 4an de oktobro | Encikliko *E supremi apostolatus cathedra,* pri la programo de la papado. |
| | 22an de novembro | Reformo de la liturgia muziko per la "motu proprio" *Tra le sollecitudini*. |
| 1904 | 20an de januaro | Kondamno de la eksteraj vetooj dum la konklavoj, per la deklaro *Commissum nobis*. |

| | | |
|---|---|---|
| 1904 | 2an de februaro | Encikliko *Ad diem illum* okaze de la 50a datreveno de la proklamo de la dogmo pri la Senpeka Koncipiteco de Maria. |
| | 19an de marto | Kodigo de la kanonika juro per la "motu proprio" *Arduum sane munus*. |
| 1905 | 15an de aprilo / | |
| | 20an de decembro | Encikliko *Acerbo nimis,* pri la katekismo. Encikliko *Sacra Tridentina Synodus*, pri la Eŭkaristio. |
| 1906 | 11an de februaro | Encikliko *Vehementer,* pri la apartigo de la Eklezio disde la Ŝtato en Francio. |
| 1907 | 8an de septembro | Encikliko *Pascendi dominici gregis*, pri la Modernismo. |
| | 29an de junio | Reformo de la roma Kurio per la apostola deklaro *Sapienti consilio*. |
| 1908 | 18an de septembro | Lia pastra Jubileo. Alvoko al la klerikaro *Haerent animo.* |
| 1909 | 7an de majo | Encikliko *Vinea electa*, por la fondo de la Biblia Instituto. |
| 1910 | 8an de aŭgusto | Dekreto *Quam singulari Christus amore,* pri la komunio al la geknaboj. |
| 1914 | 2an de aŭgusto | Alvoko *Dum Europa,* por petegi la ĉesigon de la militagoj. |
| | 20an aŭgusto | Li mortas je la horo 1.16. |
| 1923 | 28an de junio | Inaŭguro de la monumento honore al li, en la Vatikana Baziliko. |
| 1923-1931 | | Diocezaj procesoj en Romo, Venecio, Mantovo, Treviso. |
| 1943 | 12an de februaro | Dekreto por la enkonduko de la proceso por beat- kaj sankt-proklamo. |
| 1943-1946 | | Apostolaj procesoj en Romo, Venecio, Mantovo, Treviso. |
| 1951 | 3an de junio | Beatproklamita en la Baziliko de Sankta Petro en Romo. |
| 1954 | 29an de majo | Sanktproklamita en placo Sankta Petro en Romo. |